

5^a JARO.

OCEANO

N^{ro} 1^a.

TRA LA MONDO.

• TUTMONDA • ILUSTRATA • REVUO • ESPERANTISTA •

JULIO

1907.

GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

ĈIULANDA VIVADO: Internacia enketo pri edukado. — L'Ecole des Roches (La Lernejo de P' Ŝtonegoj), de *Th. Rousseau*, (FRANCUJO).

NUNTEMPAĴOJ: Mōnata kroniko, de *Eugène Montrosier*.

SPORTOJ: Sokolaj Festoj en Praha, de *V. Riegel* (BOHEMUJO).

ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO: J. J. Rousseau juĝita de Jules Lemaitre, de *Pro Buquet* (FRANCUJO).

DIVERSAĴOJ: La Rök-Ŝtonoj, de *H. Skog* (SVEDUJO).

VIRINA PAĜO: La Modo, de *Roksano*.

SCIENCA KRONIKO: La Internacia Scienca Oficejo, de *H. K.* (SVISUJO).

FELIETONO: La specialistoj, de *J. H. Salomon* (ROLANDUJO).

GEJUNULA PAĜO: Mia plej bela aventuro, de *Zacherl Karl* (BAVARUJO).

MIKSAĴOJ: Amuzaĵoj, problemoj, de *Ch. Brunet*.

PROPAGANDA ALDONO.

(Nur por la abonintoj).

Internaciaj vizitoj, de *Ch. Bégel* (FRANCUJO). — Esperanto kaj Ruĝa-Kruco, de *Leŭt° Bayol* (FRANCUJO). — Kroniko, Bibliografio.

CAROLINE
1907. OXFORD, EV.

UNU NUMERO: 75 CENTIMOJ.

Premio al niaj legantoj.

Por esti agrablaj por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorloĝon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude (ĝustagrande).

En la du kvalitatoj, la poŝhorloĝo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».


Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr. Por Rusujo, aldoni 5 fr. por la transporto kaj limdepago.

Por U. Ŝ. de A., aldoni 10 fr. por la limdepago. Antaŭa pago estas *necesega*.



ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,
Oportuna, Pura,
Neestingebla
en Ventego,
Funkciadas bonege
nur kiam oni uzas
la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn

1/5.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague,
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

Sr G. RUTTER, 30, Red
Lion Squar, LONDON.



ESPERANTISTOJ

PASIGU LA SOMERON

EN

Aix=les=Bains

(FRANCLANDO)

Sendu 30 centimojn al la _____
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO
kaj vi ricevos aŭfranke la interesan broŝuron
de D^{ro} J. DARDEL, pri la termala kuracado
en tiu urbo. _____

Propagandaj verkoj.

« Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj », de
A. Saĥarov. Kolekto de artikoloj pri internacia
lingvo Esperanto, en Esperanto kaj rusa ling-
voj, kun gramatiko kaj vortaroj: 1 fr. 60, ĉe
la Ardatova, Simb. gub. Esperantista grupo.

« Solvo de la problemo de lingvo interna-
cia », laŭ S^{ro} de Beaufront, esp. de Prof.
Christaller. Bonega propagandilo germane kaj
Esperante. Ĉe Germana Esperantisto: 75 pf.

« Idiome Internacional Esperanto », nova
propagandilo de nia fervora meksika sami-
deano D^{ro} Ambrosio Vargas, dediĉita al la
Prezidanto de la Respubliko kaj al la ministro
de l' publika instruado. De la sama, « Ligeros
Apuntes Sobre Esperanto ».

La grupo esperantista en Wiesbaden deziras
eldoni « Esperantan kantarono » kaj petas la
ĉiulandajn samideanojn sendi kiel eble plej
multe da Esperantaj kantoj (tekstoj kaj notoj).
Ĉe S^{ro} Otto Gehrke, Wiesbaden (Germanujo),
Eleonorenstr. 7.

Teatra verko.

« Bonegaj atestoj » tre amuza sceneto, de
S^{ro} R. Paillot, la sindona sekretario de la
Lille'a grupo, tute taŭga por la esperantistaj
festoj. Ni ĝin rekomendas al tiuj, kiuj deziras
ridi kaj ridigi. 50c, ĉe la librejo Taillandier,
11-13, rue Faidherbe, Lille, France.

Ni estos danka al kiu bonvolos al ni sendi
la adreson de Sino Hulanicka.

FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

Rilatoj inter Paris kaj Svisujo.

I. — *Taĝaj vagonaroj ekspres' (duonrapidaj)*
al Berne, Lausanne kaj Brigue.

(V-R; F-L; 1^a kaj 2^a klasoj — 1^a kaj 2^a klasoj
Paris-Berne).

Iro: deiro de Paris — 8h. 25 m.

REIRO: deiro de Lausanne — 2h. 25 v.

» Berne — 1h. 32 v.

II. — *Noktaj vagonaroj ekspres' al Berne,*
Interlaken, Lausanne kaj Brigue.

Iro: a) deiro de Paris 10h. 30 v. al Berne,
Interlaken, Lausanne kaj Brigue.

L-S; 1^a kaj 2^a kl. Paris-Berne;

V-L; Paris-Berne: 1^a Julio — 30^a Sept;

V-L; L-S; 1^a k. 2^a kl. Paris-Interlaken:

1^a Julio — 15^a Sept.

Nota. Depost la 30^a de Sept., la deiro

al BERNE okazos je 10h. 20.

b) deiro de Paris 10h. 20 v. al Lausan-

ne, Brigue.

V-L; L-S; 1^a k. 2^a kl. Paris-Lausanne.

REIRO: deiro de Lausanne 10h. 40 v.

» Bernc 9h. 47 v.

(Samaj vagonaraj konsistoj kiel ire)

III. — *Luksaj vagonaroj trionmonataj « Sim-*
plon-Oberland-Ekspres' » al Berne kaj

Interlaken (6^a Julio 15^a Sept.). V-L; V-R.

Iro: deiro de Paris' — 8h. 30 v. Lunde,

Merkrede, Sabate.

REIRO: deiro de Berne — 11h. 08 v. —

Marde, Ĵaŭde, Dimanĉe.

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj
ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn NE esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l' Esperanto
(Internacia esperantista librerio)

15, Rue Montmartre
Paris.

Nova adreso



Ĉampanvino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo
por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en keston.

Ĉe S^{ro} Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France

Internaciaj vizitoj.

La Britaj delegitoj en Lyon'o. Projekto de Thomas Barklay. Neeeseco de lingvo internacia.

La 16^{an} de majo, alvenis Lyon'on cent dudek kvin delegitoj el diversaj anglaj urboj (Manchester, Salford, Edinburg, Glasgow, Huddersfield, Leith), invititaj de la urbestro de Lyon'o, por respondi al simila vizito farita, antaŭ unu jaro, de dek ses Lyon'aj delegitoj, en Anglujo.

En ambaŭ landoj, la akceptoj estis koraj, entuziasmaj kaj luksaj.

La angla delegitaro vizitis sinsekve ĉiujn gravajn instituciojn kaj vidindaĵojn en Lyon'o, inter kiuj: la nacian konkurson de terkulturaj maŝinoj, la ekspozicion de florkulturo, la rimarkindan ekspozicion de urba higieno; la muzeojn, la silkanalizejon, diversajn laborejojn de silkteksado, la novan lernejon de « Plena aero » en belega parko, taman fabrikejon de aŭtomobiloj, grandan silkfabrikejon, la faman konstruaĵon de Jonage por la utiligo de la Rhone'a movforto, la muzeon de teksaĵoj, kiu estas la plej riĉa kaj rimarkinda en la mondo; la « Feston de la lernejoj », organizitan, je ilia honoro, en la fama « Parc de la Tête d'or » (parko de la ora kapo), kun

kvin mil partoprenantaj infanoj, la kreskaĵajn varmejojn en la sama parko; la ĵus konstruitan lernejon « La Martinière » por junulinoj; la universitatajn Fakultatojn de medicino, sciencoj, legoscienco kaj literaturo, k. t. p.

En la programo troviĝis ankaŭ prezentadoj klare elektitaj kaj organizitaj en diversaj teatroj; la akcepto de la Prezidanto de la Respubliko, kiu estis akompanata de tri ministroj; festenoj en la Urba domo, en la Pre-

fektejo, en la Komerca Palaco, k. t. p.

Dum kvin tagoj, la Britaj delegitoj estis gastoj kore kaj inde festataj de la urbestro, de la registaro kaj de la tuta loĝantaro.

Tamen, ombro aperas sur la pentraĵo! Sendube, dank' al klera organizado de tiuj vizitoj, al gvidlibreto lukse presita kaj zorge verkita en du lingvoj, dank' al multaj tradukistoj akompanantaj la vizitantojn, tiuj akceptoj atingis partempe sian celon: instruigon por la delegitoj pri l' administrado, la institucioj, industrioj, riĉaĵoj, vidindaĵoj

de granda fremda urbo. Sed la iniciatintoj de tiuj vizitoj, speciale la tre distinginda urbestro de Lyon'o, Sinjoro Herriot, precipe celadis starigi por du grandaj nacioj, koran konsenton, kiu povus poste etendiĝi, per simila rimedo, al ĉiuj aliaj nacioj.

Por ricevi tiun gravan rezulton, estus dezirinde ke vizitantoj kaj vizititoj povu senpere kompreni reciproke, esprimi siajn ideojn kaj sentojn per komuna lingvo.

En tiaj cirkonstancoj, elmontri la taŭgecon kaj la praktikecon de Esperanto estas devo por la esperantistoj. La « Lyon'a esperantista grupo » kaj la « Edinburga esperantista societo » komprenis tiun devon.

Per ilia komuna iniciativo, dum solena akceptado, la 16^{an} de majo, en la belege ornamitaj salonegoj de la urba domo, kie ĉeestis kvar mil invititoj, intervidiĝo estis aranĝita inter Lord Gibson, urbestro de Edinburg'o, kaj la Lyon'aj esperant-



Kopirajto.
D^{no} DOR.

TRE HON. P. GIBSON.
Lord Provost de Edinburg'o.

Alb. Wallener.
SIR TH. BARCLAY.



Kopirajto.

Fot. de « Le Progrès ».

LA PREZIDANTO DE LA FRANCA RESPUBLIKO KAJ LA ANGLAJ
URBESTROJ EN LYON'O.
1. — S^{ro} Fallières, Prezidanto de la Respubliko; 2. — S^{ro} Ruau,
Ministro de la Terkulturo; — S^{ro} Herriot, Urbestro de Lyon'o.

istoj: S^{oj} D^{ro} Dor, prezidanto de la Lyon'a grupo, Offret, ĉefsekretario, Godart, deputato kaj suburbestro, Pic, urbkonsilanto, D^{ro} Soulier, Blum, Bégel, Desronsière, S^{ino} Primard-Michel kaj multaj aliaj.

S^{ro} D^o Dor, bedaŭrante ke li ne povas paroli Esperante, ĉar neniu el la anglaj delegitoj estis esperantisto, prezentis, en la plej pura angla lingvo, la saluton de la Lyon'aj esperantistoj, memorigis pri la ĉiamaj koraj rilatoj inter Franclando kaj Skotlando, klare valorigis la utilecon de lingvo internacia, — aparte evidenta en tiu okazo, — kaj esprimis la deziron ke Lord Gibson helpu laŭ sia povo la propagandon de niaj anglaj amikoj, kaj fine donis al li leteron de la Lyon'a grupo por la Edinburga esperantista societo.

Lord Gibson tre afable respondis, ĉiam angle, ke li estas tute konvinkita; ke li favoros laŭpove la esperantistan movadon, kaj ke li mem intencas lernadi Esperanton.

La iniciato pri tiaj internaciaj vizitoj inter delegitoj de ĉefurboj estas ŝuldata al honorinda angla bonfarantulo, Sir Thomas Barklay, kiu tiele alportas al la esperantistoj neatenditan kaj tutpovan helpon. Lia projekto ne limiĝas al la vizitoj de urbestroj; tiu eminentulo revis pri la reciproka penetrado de la popoloj mem, per sinsekvaj vizitoj de delegitoj de ĉiuj popolklasoj (universitataj, studentoj, ĉiumentiaj laboristoj, k. t. p.), por altega celo: la tutmonda paco.

Kiu ne komprenas, ke al tia vasta kaj nobla pro-

gramo kontraŭstaras la lingvaj bariloj, kaj ke ĝi ne povas esti plene fruktodona sen komuna lingvo? La ĉeestado de la anglaj delegitoj en Lyon'o montris evidente la malfacilecon kaj ofte la neeblecon de reciproka kompreniĝo. La malvarmiga nesufiĉeco de la tradukistoj ne povas anstataŭi la senperan komunikadon. La Angloj, dum sia vojaĝo en Francujo restis, krom maloftaj esceptoj speciale elektitaj, nepenetrebla aro de fremduloj, nekapteblaj, malgraŭ sia bonvolo por sin intime miksi kaj fratiĝi kun la popolo, kiun ili vizitis.

Oni komparu tiajn ĝenatajn intervidiĝojn kun la tiel facilaj, vivplenaj, kaj sekve vere koraj kunvenoj en la esperantistaj kongresoj, kie diversnaciuloj el pli ol dudek landoj, povas senĝene interparoladi pri ĉiuj temoj, same kiel sammaciuloj! Baldaŭ tiu eksperimento renoviĝos ĉe la 3^a esperantista kongreso en Cambridge. Ni konsilas la urbestrojn kaj registraranojn, ke ili ĉeestu al tiu inspirema kaj konvinkodona spektaklo.

Sen internacia lingvo, la vizitoj projektitaj estos kvazaŭ kunvenoj de surdmutuloj, en kiuj la sola vidado povas ekzerciĝi sed ne la intima konatiĝo, kiu naskas estimon kaj amikecon, kio estas la lasta kaj ĉefa celo.

La konkludo trudiĝas: antaŭ ĉio, disvastigi la internacian lingvon « Esperanto! »

CH. BÉGEL (Bejel).

Subsekretario de la Lyon'a esperantista grupo.



Bibliografio.

La bulgara « Lumo » aperas nun presita, sub verda kovrilo, kaj celas propagandi Esperanton kaj ankaŭ konigi la bulgarajn aĵojn. Lia kosto altiĝis ĝis 3 fr. 50 (1,40 Sm) en Bulgarujo kaj 5 fr. (2 Sm.) alilande, ni deziras sukceson al la kuraĝa entrepreno.

Rilate la propagandon daŭras esti pleje rimarkinda « La Belga Sonorilo ». La n^o 64^a (16^a de Junio) enhavas gravajn oficialajn dokumentojn, nome: eltiraĵo el la oficiala protokolaro de kunsido ĉe la Reĝa Akademio de Belgolando (13 Ap. Klaso scienca), raporto prezentita de S^{ro} Mourlon, D^{ro} de l' Geologia belga Oficejo, en kiu estas tre favore parolate pri Esperanto; artikolo de S^{ro} Paul Mansion, universitata prof^o en Gand, pri la elekto de lingvo internacia; kompleta « decida projekto pri enkonduko de Esperanto en la programojn de instruo en Francujo », prezentita de S^{ro} Lucien Cornet, kaj subskribita de 70 aliaj deputitoj.

La « exposé des motifs » (klarigo pri la motivoj) estas tre utila dokumento por francaj esperantistoj.

En la n^o 64^a, alia grava dokumento: eltiraĵo el parolado de S^{ro} Lafontaine, ĉe la belga Senato (kunsido de l' 4^a de Junio) en kiu la aŭtoro, pritaktante pri la universiĝo de l' demandoj pedagogiaj kaj instruaj, aludas kiel *malutopian* ideon la disvastigon de lingvo internacia, kaj tre favore parolas pri la internacia monsisistemo proponita de S^{ro} R. de Saussure (kiu ni uzas nun por niaj anoncoj).

Vere, tiaj artikoloj, france skribitaj, estas bonega armilo en la manoj de francilingvaj samideanoj, kaj ili igas « Belga Sonorilo » pli kaj pli atentinda por la francilingvaj grupoj. Tiu ne devas mirigi, se oni memoras ke ĝia distingva direktoro, Komandanto Lemaire Ch., estas ano de la « Franca societo por la propagando de Esperanto ».

« Portugala ŝlosilo » modelo Ĉefeĉ. Ĉe *Internacia propagand-ejo esperantista*.

Tiu broŝureto helpas multe la agadon de niaj fervoraj brazilaj amikoj

« Esperanto » kvazaŭa ŝlosilo por Rusoj, ĉe Ruslanda Esperantisto (sen prezo).

Ĉe *Hachette & Cie, Paris*. — Essence et avenir de l'idée d'une Langue internationale, texte Esperanto de Unuel; franca

traduko de L. de Beaufront kaj D^o Vallienne. 30 c. — 0,12 Sm. — L'Esperanto, Conférence aux officiers de l'École supérieure de la Marine par M. Carlo Bourlet, 50 c. — 0,20 Sm. — Eltiraĵoj de « La Revuo »: D^o L. L. Zamenhof: La Revizoro, de Gogol. 1 fr. 50 — 0,60 Sm. — La Predikanto, Libro et la Biblio. 75 c. — 0,30 Sm.

Vocabulaire technique et technologique Français-Esperanto, de Ch. Verax.

Nia literaturo senĉese pliriĉiĝas kaj formas jam ampleksan tuton. La katalogo « Literaturo de Esperanto » de la firmo *F. Topič, Praha-I, Ferdinandova 11*, ĝin montras tre agrable.


Jen kelkaj novaj literaturaj verkoj:
« La Muelilo kiu ne plu turniĝas » ĉarma rakonto de René Bazin, franca akademiano, bone tradukita de René Badert, komitatano de l'esperantista grupo en Tours. 20 c — 8 Sd. ĉe *Esp. Oficejo, 5, Rue Michelet, Tours*.

« Libreto pri transmorta vivo », de Gustav-Theodor Fechner (germano) bonege tradukita de P. Kadik 75 c. — 0,30 Sm. ĉe *P. E. S.*

« Morituri vos salutant », de V. Papazjan (armeno). Dua kajereto de universala Esperanta biblioteko eldonata de S^{ro} A. Marich (*Hungara Esperantisto*). Ĝi estas rakonto pri la teruraj armenaj buĉadoj, verkita de nia bonega kunlaboranto Georgo Davidov, al kiu ni devas la impresan rakonton « Guteton da lakto! ». 30 hel — 0,135 Sm.

« Tra la Esperanta Literaturo », de Prof. Luigi Giambene: 50 elĉerpajoj, lerte elektitaj, el malsamaj verkaĵoj esperantaj. Ni trovis en ĝi, plezure, la belan preĝon en versoj, deklamitan de D^{ro} Zamenhof dum la kongreso en Boulogne, kaj presitan tute kaj aŭtografie en « Tra la Mondo », Aŭg. 1905. La plej bonaj esperantistaj aŭtoroj troviĝas en la verkaro, kaj inter ili ni rimarkis la jenajn kunlaborantojn de nia gazeto: Boulet, Rust, Southcombe, Berthelot, Sentsis. 1 fr. 15 afr. — 0,46 Sm. ĉe *Prof. Luigi Giambene, 198 Babuino, Roma (Italujo)*.

« Internacia krestomatio », elektita kaj tradukita de Kabe, laŭ verkoj de A. Dumas, A. Ĉeĥov, M. Gorkij, R. Kipling, A. Niemojewski, M. Serao, H. Sienkiewicz, B. Suttner. (Sen prezo — ĉe la *librejo M. Arct, Warszawa, Polujo*).



kl. Ecole des Roches.

LA LERNEJO « DES ROCHES ».

La Domo de l' pinoj, inaŭguraciita en Oktobro 1900. (Malantaŭa fasado).

Internacia enketo pri Edukado (*)

17 Landoj partoprenintaj.

L'Ecole des Roches (La Lernejo de l' ŝtonegoj).

En Francujo, en la ŝtataj liceoj aŭ kolegioj, oni precipe zorgas, kiel mi jam tion diris, pri la urba edukado de la infanoj. La instruistoj de tiuj duagradaĵoj lernejoj estas tie nomataj profesoroj. Por esti profesoro en kolegio oni devas havi licenciatan diplomon. Por esti profesoro en liceo estas necese havi agregacian diplomon. Tiu lasta diplomo egalvaloras proksimume la alilandan doktoran diplomon. Tiun lastan diplomon, kiu en Francujo estas tre malfacile trafbla (almenaŭ pri literaturo kaj sciencoj), havas preskaŭ nur la Universitataj profesoroj.

La lernado en la duagradaĵoj lernejoj daŭras sep jarojn, post kiuj la lernantoj estas ekzamenataj por ricevi la abiturientan diplomon. Tiu ekzameno ne estas farata en la liceoj aŭ kolegioj sed en la Universitatoj, kaj la juĝantaro enhavas Universitatajn kaj duagradaĵojn profesorojn. Nuntempe, oni pretendas, ke ekzameno farata antaŭ liceaj profesoroj estus pli justa kaj pli ĝusta, kaj eble post kelke da tempo, la nunan diplomon anstataŭos nova, kredible laŭ la germana maniero. La programo de la nuna ekzameno estas tre vasta, kaj oni povas senŝancele diri, ke la junuloj, kiuj sukcese ĝin plenumas, havas multajn kaj precizajn konojn.

Oni tamen riproĉis al la programo de la francaj duagradaĵoj lernejoj, ke ĝi estas tro literatura, tro klasika, ne sufiĉe moderna. Jam en la lastaj jaroj oni donis pli gravan lokon al sciencoj, parolataj lingvoj, kaj pli ĝenerale al la praktikaj konoj. Sed por tio la registaro renkontis multe da kontraŭstaroj, ĉar antaŭ ĉio, Francujo estas lando klasika, kiu ankoraŭ nuntempe ludas en la mondo rolon pli gravan en la fakoj de beletristiko, belartoj kaj senprofitaj sciencoj, ol en la fakoj de komerco, industrio aŭ de sciencaj aplikajoj.

Ankaŭ oni riproĉis al la francaj duagradaĵoj lernejoj ke ili estas nur lernejoj kaj tute ne edukejoj, laŭ la korpa kaj eĉ morala vidpunktoj. Kelkaj modernemaj homoj, post paroladoj de Jules Lemaître, Gabriel Bonvalot en Sorbonne, kaj post rimarkitaj artikoloj en gazetoj, provis fondi privatajn duagradaĵojn lernejojn laŭ principoj tute novaj. Ni unue povas citi, inter ili, tiun de: « Les Corbières maritimes » en St. Servan (Ile et Vilaine), en kiu oni multe zorgas pri korpa edukado, kaj pri higieno, kaj kie la gepatroj povas partopreni la edukadon de siaj infanoj, ĉar ili povas logi en speciala paviljono (dometo) apud la lernejo.

Sed la plej interesa entrepreno estas la fondo de « l'Ecole des Roches ». Tiun lernejon kreis en 1899, meze de kamparo je tri kilometroj de Verneuil (Eure), en Normandujo, S^{ro} Demolins, post longa restado en Anglujo, kie li studadis la tiean edukadon.

S^{ro} Bertier, nuna direktoro, bonvolis skribi al mi detalajn klarigojn, kaj komuniki al mi broŝuron titolitan: « l'Ecole des Roches » el kiu mi donas resume, jenajn eltiraĵojn:

La lernejo « des Roches ».

Ĝenerala vivmaniero en la lernejo. — « Ĉiu konas la ordinaran licean aŭ kolegian profesoron. Li loĝas kun sia familio ekster la lernejo. Li tien venas nur por fari sian lecionon; kiam la leciono estas finita, li malsupreniras el sia katedro, kaj rapidas reveni hejmen.

Dum la leciono, la profesoro ne povas persone kaj daŭre rilatiĝi kun ĉiu lernanto.

Ankaŭ ekzistas la observistoj. Ĉi tiuj havas pli multe da rilatoj kun la lernantoj, sed tiuj rilatoj

(*) Sekvo. Vidu la Nejn 8an, 9an, 10an, 11an, 12an (IIa Jaro) de la gazeto.

estas plej ofte malagrablaj. Li ja loĝas kaj manĝadas en la lernejo, sed lian senĉesan ĉeestadon nur kaŭzas la neceso senĉese observadi. Ĉi tiujn infanojn, forlasitajn de la profesoro, li devas obeigi, timigi kaj puni; kaj, pro tio, la lernantoj ja sin mem edukadas per siaj kamaradoj, kaj kun ili: kaj tiu edukado, esence konsistas el elpensado de mil kaj mil ruzoj, por trompi tian kunpreman observadon. Memkompreneble, la infanoj plej ŝatas tiujn el ili, kiuj sin montras plej multimemaj en tiu kontraŭstarado al aŭtoritateco; kaj, ĉar la batalado ne estas egala inter ili kaj la aŭtoritateco, ili devas fatale, por ekvilibrigi la fortojn, uzi kaŝemon kaj mensogemon.

En la lernejo «Les Roches» ekzistas nek tiaj profesoroj nek tiaj observistoj. La profesoroj vivadas tute en la lernejo; ili tie loĝas kaj manĝadas kun la lernantoj en la komuna manĝoĉambro, po dek lernantoj ĉe ĉiu tablo, prezidata de unu profesoro, viro aŭ virino. Ĉar, se profesoro estas edzo, lia edzino plenumas en la lernejo, instruan aŭ mas-truman oficon; kaj tiel, ĉeestado de virinoj donas

donu al la infanoj, eĉ al la plej junaj, la tre klaran senton, ke ili estas homoj. Tial la infanoj neniam havas, kontraŭ siaj profesoroj, tiun sintenadon iom kurbiĝan kaj humilan, iom duban, kiu estas tiel ofta en nia lando. Nia celo estas elfari knabojn fortajn pri korpo, memdependaj pri karaktero, kiuj sin mem regu, knabojn kapablajn kontraŭiri la malfacilaĵojn de la vivo kaj ilin superiri.

La lernprogramo. — La infanoj estas akceptataj de la oka ĝis la dek kvara jaro; en oka, sepa, sesa kaj kvina klasoj, ili ne lernas la latinan nek la grekan lingvojn; tiamaniere ili havas sufiĉe da tempo por lerni francan kaj fremdajn lingvojn kaj sciencojn.

Por la parolataj lingvoj, oni elektis la plej efikan metodon. Ĉiuj lernantoj restadas inter la oka kaj kvara klasoj dum tri, ses aŭ dekdu monatoj en Anglujo kaj en Germanujo, en korespondantaj lernejoj. Kiam ili estas revenintaj, ili komprenas kaj parolas la anglan kaj germanan lingvojn, kaj tio ebligas uzi tiujn lingvojn dum la lecionoj kaj dum la manĝoj.

Por instrui la naturajn sciencojn oni uzas la senperan observadon. La lecionoj estas farataj dum posttagmezaj ekskursoj sur la kamparo, kaj samtempe tio estas ekzerco utila por la korpa sano. Vere, edukadi tiajn infanojn inter kvar muroj kaj monaĥeje estas metodo, kiu estus kontraŭhigiena eĉ por maljunuloj; ridinda kaj kruela sistemo, kontraŭ kiu oni devas fine starigi la publikan indignon.


Ni devas ankaŭ montri kelkajn plibonigojn, kiuj donas plej bonajn rezultatojn. Ĝis la kvara klaso, ni uzas la lernlecionon kaj unikan profesoron, almenaŭ por la ĉefaj fakoj; ĉiu profesoro tiamaniere povas observi kaj direkti la laboron de lernanto, pri kiu li estas plene responda. La instruado de literaturo, historio, geografio estas paralele farata tiel ke ili klarigas unu la alian; al komentario pri la aŭtoroj oni aldonas legojn laŭ tiuj aŭtoroj; matematikoj estas konkrete instruataj kaj kun alfarataj aplikajoj. Fine, oni donas grandan gravecon al desegno, kiu, ne parolante pri ĝiaj multaj praktikaj uzoj, kutimigas la infanojn rigardi atente kaj precize.

Enirante la kvaran klason, kiam oni jam povas taksila preferojn kaj la kapablojn de la infanoj, estas decidate, ĉu ili elektos klasikan aŭ modernan instruadon. Tiuj, kiuj lernas la latinan lingvon, ĝin lernas rapide ĉar je tiu aĝo, ilia spirito estas jam sufiĉe matura, kaj pretigita por studo, kiu necesigas pripensadon kaj logikecon. Oni precipe uzas la metodon de la apuda traduko.

Esperanto estas instruata de du jaroj en la lernejo.

Fine ekzistas speciala sekcio por la infanoj, kiuj ne deziras plenumi la abituriantan ekzamenon kaj preferas pli praktikan instruotecon, tuj uzotan.

Praktikaj laboroj. — Matene kaj vespere la knaboj estas okupataj pri lernado. De la 2^a ĝis la 4^a posttagmeze ili estas okupataj pri praktikaj laboroj, kiuj estas natura komplemento de la teoriaj studoj, pri ludoj kaj korpaj ekzercoj.



Kl. «Ecole des Roches».

LERNEJO «DES ROCHES». ĈE TABLO DUM LA SOMERO.

Kiel oni vidas per tiu interesa ilustraĵo, la vivado ĉe la lernejo estas vere familia.

al la infanoj la kutimon havi pli bonan sintenadon, malhelpas ke la lernejo fariĝu soldatejo, kaj fine evitas ke la junuloj, kiam ili forlasas la lernejon, subite kaj sen prepare eltrovu Virinon.... Plie la profesoroj vivadas la tutan tagon kun la lernantoj. Ili partoprenas ĉiujn iliajn ekzercojn t. e. ne nur lecionojn, sed ankaŭ la libermomentojn, ludojn, banojn, k. c. Tiamaniere ili rilatas kun la infanoj kiel patro kun siaj infanoj. La lerneja vivado do tute similas la realan vivadon.

Knaboj elektitaj de la estroj kaj ankaŭ de la lernantoj, kaj nomataj *kapitanoj*, estas respondeblaj pri la ordo, kaj bona sintenado de siaj kamaradoj. La lernejo estas kvazaŭ propraĵo de la infanoj. La konfido kaj respekto, kiujn oni havas al ili, naskas en ili la memfidecon kaj memrespekton.

Mi ne kredas, — diras S^{ro} Demolins — ke ekzistas pli efikaj rimedoj por elformi homojn. Eĉ la detaletoj de la edukado estas aranĝitaj, por ke ili

La praktikaj laboroj estas terkulturado, fer - kaj lignolaboroj. Certe oni celas elfari el la knaboj nek terkulturistojn, nek forĝistojn, nek ĉarpentistojn, sed oni nur celas pligrandigi la lertecon de ilia manoj, kaj konigi al ili la ĉefajn aspektojn kaj problemojn de la kampara kaj industria vivadoj. Por tio, ili ankaŭ vizitadas la farmbienojn kaj fabrikejojn, kiuj estas tre multaj en la ĉirkaŭaĵo.

La ĉefaj ludoj kaj sportoj estas futbalo dum vintro, kriketo kaj teniso somere, biciklo kaj boatirado ĉiusezone. Boatirado estas speciale atentinda ĉar ĝi precipe fortikigas la brakojn kaj la bruston, dum aliaj sportoj ĉefe efikas sur la kruojn.

Tiel la diverseco de la studoj plivastigas la spirittajn ecojn, kaj la diverseco de la fizikaj ekzercoj celas plivastigi ĉiujn partojn de la korpo. Ĉar taŭga edukado devas malzorgi nek spiriton nek korpon, ĝi devas pligrandigi al infano, samtempe la larĝon de la inteligento kaj la larĝon de la brusto.

Fine, parto de la vesperoj estas uzataj por literaturaj aŭ muzikaj kunvenoj kaj mondumaj amuzoj. Tio celas elformi socialan viron, mondumulon, kutimigante la knabon esti nek mallerta nek timema, kaj ĝui la kunestadon kun pli maljunaj personoj. La edzinoj kaj familioj de la profesoroj, kaj personoj, kiuj ne apartenas al la lernejo, ofte ĉeestas tiujn kunvenojn.

Estas en la lernejo protestanta kaj katolika pastroj.

Jen estas la hortabelo :

- 6 h. 25. — Ellitigo, duŝo, tualetoj, preĝo.
- 6 h. 45. — Kurado.
- 7 h. 10. — Libermomento; la lernantoj ordigas sian liton.
- 7 h. 20. — Lernado.
- 7 h. 50. — Matenmanĝo (tre nutra).
- 8 h. — Unua leciono.
- 9 h. 05. — Dua leciono.
- 10 h. 05. — Libermomento.
- 10 h. 20. — Tria leciono.
- 11 h. 20. — Kvara leciono.
- 12 h. 30. — Tagmanĝo.
- 1 h. — Libermomento.—Vestŝanĝo.
- 2 h. — Ludoj, manlaboroj, ekskursoj, muziko, k. a. (laŭ la tagoj kaj sezonoj).

3 h. 30. — Memlavo kaj vestŝanĝo.

4 h. — Manĝeto.

4 h. 30. — Lernado aŭ leciono.

7 h. — Memlavo. Vespermanĝo.

7 h. 30. — Libermomento.

8 h. 05. — Nomvokado kaj lernado. — Enlitigo de la plej junaj.

9 h. 15. — Enlitigo de la plej maljunaj.

Oni laboras egale dum ses tagoj ĉiusemajne. Nur dimanĉe oni ripozas.

La libertempoj daŭras tri semajnojn je Kristj nasko kaj je Pasko, kaj du monatojn en julio kaj aŭgusto. Ĉiusemajnaj aŭ ĉiumonataj eliroj ne ekzistas ».


Oni certe konsentos, ke en tiu lernejo estas efektivitaj multe da bonaj ideoj. La registaro mem tion konfesis en Francujo, ĉar de la tempo kiam oni fondis tiun lernejon, multe da plibonigoj de la edukado en la kolegioj kaj liceoj estis farataj laŭ tiuj principoj. Sed, bedaŭrinde, oni estas tre rapide haltigita sur tiu vojo, pro la financaj rimedoj. Oni ne forgesu, ke la duagrada ŝtata lernejo estas fonditaj ĉefe por eduki la infanojn meze riĉajn, aŭ eĉ malriĉajn per la publika kaso; kaj klare estas ke edukada sistemo kiel tiu de « Les Roches » estas tre multekosta. En « Les Roches » la prezo ĉinjara estas 3.000 fr. (1188 Sm.), sed tamen, por la mezriĉaj familioj la edukado en la lernejo direktata de S^{ro} Bertier estas eble la plej rekomendinda ĉar, kiel diras S^{ro} Demolins, la plej bona doto por knabo estas vira edukado.

La lernejo havas ĵurnalon eldonitan ĉe Firmin-Didot en Parizo kaj redaktata de la lernantoj kaj profesoroj. S^{ro} Demolins eldonis en la sama firmo libron titolitan « *l'Ecole Nouvelle* » (Nova lernejo) tradukitan en ses lingvojn.

Mi ankaŭ uzis por verki tiun raporton, tre interesan skribaĵon al mi senditan de nia bonega amiko D^{ro} Saquet, konsulo esperantista en Nantes.

TH. ROUSSEAU.

T. BUSO.



Kl. « Ecole des Roches ».

LA KRIKETLUDO ANTAŬ LA LERNDOMEĜO.



NUNTEMPAĴOJ

Monata Kroniko.

En mia lasta kroniko mi dediĉis kelkajn liniojn al Joris-Karl Huysmans, la fama verkisto, kiu ĵus mortis en teruraj kondiĉoj, kaj kiu suferis sian longan agonion kun admirinda stoikeco. Tiu nomo konata: Huysmans, elvokas en mi memorojn agajn je pli ol tridek jaroj. Tiam mi direktis ilustratan kaj literaturan revuon nomatan *Le Musée des Deux-Mondes* (muzeo de l' du mondoj). Anstataŭ grupi ĉirkaŭ mi, kiel kutime, konatajn verkistojn kies reputacio ne plu estas farota, mi penadis eltrovi junajn talentajn literaturistojn. Tiel post la publikigado de l' *Drageoir aux épices* (sukermigdalujo por spicaĵoj), de Huysmans, mi venigis lin kaj lin enigis en min kunlaborantaron.

Huysmans verkis, por *Le Musée* tutan serion el rimarkindaj studaĵoj.

Poste venis Paul Ginisty, Fernand Bourgeat, ambaŭ alvenintaj ĝis altaj oficialaj oficoj. Mia revuo, la unua el la francaj, malfermis siajn kolonojn por Camille Lemonnier, la eminenta plumverkisto de Belgujo. Alphonse Daudet, Anatole France, Emile Bergerat postvenis. François Coppée min donis sinksekon el prozaj rakontoj; Théodore de Banville verkis ĉe mi dekdu novelojn ĉarmajn. Francisque Sarcey, Dumas filo, Ulbach, Leon Dierx, Léon Cladel ankaŭ venis al mi, dum Léopold Flameng, Edmond Yon, partoprenis en la ilustrado de mia magazeno. Kaj ĝi estis la bona tempo, tiu kiam la priokupoj literaturaj kaj artistaj superis ĉion — precipe la politikon! kiu tiel agitadas la tutan mondon.

La malnova ekstremas, kaj ĉie la sismaj elrenversigoj rompigas la teran ŝelegon. Mont Pelé malkvietiĝas denove; Stromboli moviĝas, kaj Vezuvio rekomencas elĵeti el sia interno fumojn kaj ŝtonaĵojn brulitajn. Samaj fenomenoj ŝupraĝe. Azio, malnova lulilo de la civilizacio, agitiĝas, kaj gravaj simptomoj ekmontriĝas en Hinujo, ne kontraŭeŭropaj ĉiufiĝoj, sed kontraŭdinastiaj. Ne la fremduloj nun estas minacataj sed la regnestraro. Oni komencis buĉadante ĉiujn civilajn kaj militistajn oficulojn, kaj bruladante la «Jamen» ojn. La revolucia societo «Svatan» estras la movadon, kaj la tutaj Kuang-Si kaj Kuang-Tung bolas.

Dume anglaj Indioj montris emojn al ribelo. La kaŭzo de tiu malkvieteco, kiu maltrankviliĝis la vic-reĝon, estas la konkuro ekzistanta de longe inter la gento musulmana kaj la india. La Indianoj estas pli inteligentaj, pli civilizitaj ol siaj konkurantoj. Ili pli facile kvazaŭ eŭropaniĝis kaj, devigita akcepti la anglan potencon, ili komprenis ke la plej bona por ili estis profiti ĝin kaj la civilizacion. Tiel multaj indianoj havas, kiel okupon, liberalajn profesiojn. Unuj estas ĵurnalistoj, aliaj advokatoj, aliaj inĝenieroj. Sed la amaso, centoj da milionoj da neinstruituloj, kiujn multope mortigas la malsato kaj la pesto, ekagitiĝas kaj minacas la anglan regecon; tiu ĉi densiĝas ĉiujn siajn disponeblajn fortojn al la minacataj lokoj. La bojkoto de l' anglaj komercaĵoj komencis, kaj oni ne scias kiam ĝi finiĝos.

Plue, la pesto faras terurajn ruiniĝojn; kaj de Calcutta oni donas la sekvantan statistikon pri la suferuloj, de la februara monato.

16a de Februaro ĝis 23a, 24,242 mortintoj; 24a de Februaro ĝis 2a de Marto, 32,709 m.; 3a-9a de Marto, 41,667 m.; 10a-16a de Marto, 54,003 m.; 24a-30a de Marto, 53,000 m.; 31a de Marto ĝis 6a de Aprilo, 62,000 m.; 7a-13a de Aprilo, 75,000 m. — Sume 392,061 mortintoj dum du monatoj.

La ĵurnalo *La Tribune*, de Calcutta, aldonas, ke la jaro 1907 minacas esti pli mortiga ol la 1904a, la pli suferinta el la lastaj tempoj, dum kiu la sortbatego faris ne malpli ol 1,143,000 suferulojn.

En Persujo, alia ario: la antaŭa regnestro donacis al la lando la universalan voĉrajton, kaj parlamenton. Stranga

eksperimento en lando, kie nek la ĝenerala instruiteco, nek la antaŭaj okazintaĵoj, ebligis ricevi la rezultatojn, kiujn Francujo de l' XVIII^a centjaro, preparita de la filozofoj unuflanke, kaj la *États Généraux* aliflanke, estis atingota.

Aldonu al tio, por Persujo, la politikajn kaj militistajn konkurojn, la ribeliĝon instigitan de unu el la fratoj de l' Ŝa, kaj la revolucion de l' Parsi'oj alfluantan ĝis la pordoj de l' kunsidoje. Dolĉa lando!

Dolĉa lando ankaŭ, Rusujo! baraktanta meze de tri kontraŭaj fortoj: la Imperiestro kaj liaj konsilantoj; la Duma' denove mortinta, kaj la senplana agado de la plimulto el ĝiaj anoj; kaj fine la teruriga anarĥio, kiu anstataŭas la argumentojn per bomboj, kaj la Vorto, kiu povas klerigi, de la krimo sovaĝa kaj senutila. Oni nuligas homon; neniam oni malhelpis, ke ideo ĝusta, senca, florados.

Dume, Francuje, en kvar sunbanataj departementoj sudlandaj, ribeliĝa vento blovas, maldolĉa, fortega, ruiniĝa kiel la mistral'o (*), kies kvietigon oni ne jam antaŭvidas. Tiuj kvar estas vinkulturaj La vino, la bona vino de niaj patroj, kiuj amis la « dia botelo » n, kaj ne pli malbone fartis pro tio, ne plu vendiĝas. Inter la diversaj kaŭzoj de momenta situacio oni, kvazaŭ plezure, trograndiĝis unu solan, flanklasante la aliajn, kaj oni atakegis la « trompon », riskante pli gravigi alian kaŭzon de *nevendo*: la senigo de vino, mode konsilata nun de multenombraj kuracistoj. Sed oni scias ja, inter kaj ekster landlimoj, kian bonegecon havas la francaj vinoj; unufojon plie ĝin rekonis, antaŭ nelonge, eminentulo — Sir Wilfried Laurier, la ĉef-ministro de Kanado, kiam li deklariĝis ke la francaj vinoj superas ĉiujn aliajn. Kaj kelkaj trompoj ne erarigos la publikan juĝon.

Sed atendente la krizan finiĝon, la vinujoj restas plenaj, kaj pli grandiĝas la mizero. De ĝi, malbona konsildona, venas la tuta malbono: halto de la vivo departamenta aŭ urba, rifuzo pro imposta pago: sekve kontraŭa agado de l' regnestraro, sendo de armularoj, sango elfluinta, kaj morto de homoj. Funebro ĉie, por Francujo kaj por la familioj.

Malgaja, malgajega signo de l' malkvietaj tempoj, kiujn trairas la tuta mondo: okazaĵoj minacantaj por la reĝeco en Portugalujo, politikaj skandaloj en Italujo, Germanujo; malmalikaĵoj en Suda Ameriko...

Samhore, en urbo paca kaj preskaŭ alitempa de Holandujo, en tiu urbo de Hago, dolĉa kaj gastama, kun ĝiaj malnovaj loĝejoj, ĝiaj palacoj, ĝiaj kanaloj, l' admirinda arbareto kiu kuŝas de Binnhof ĝis Scheveningue, okazas la solenaj kunsidoj de la Konferenco por la Paco. Porpacaj Konferencoj! Kiu povas forgesi, ke, depost la unua, okazis la milito en Transvaŭo kaj la terura kontraŭsaltego de l' rusaj kaj japanaj armeoj. Homama utopio tiu konferenco, kiu neniam sukcesos okazigi senarmiĝon proporcian al la graveco de ĉiu el la nacioj prezentitaj, kaj malgraŭ kiu, ĉiu el ili restados kun la armilo en la mano kaj sia « malsckigita pulvo ».

Ĉar, bedaŭrinde por la ekonomia disvolviĝo de l' nacioj, la ideoj pri senarmiĝo estas ĥimeraj: la porviva batalo, en la fakoj kie la mono ludas la ĉefan rolon, estas pli fervora, pli kruela, pli sovaĝa ol la milito por la honoro. La standardon, kiu alitemple flirtis glore supre la kontraŭaj tendaroj, oni anstataŭis de la firmmarko ornamanta la prospekton de l' komercistoj kaj fabrikistoj, per kiuj oni nun batalas. Ni ne malesperu tamen, kaj ni deziru al la *pacaj batalantoj* de Hago prosperon egalan al la sukceso, kiu atendas tiujn de Cambridge.

EUGÈNE MONTROSIER.

(*) *Forpuŝa ventego, glacia, blovanta iafoje en la valo de Rhône.*

La « Rök-ŝtono ».

En malnova sveda verko pri la provinco Östergötland la verkisto sciigas, ke « en la muro de la ilejo ĉe la preĝejo (en la paroĥo Rök) estas enmasonita « runa » ŝtono, kiu estas tute nekomprenebla kaj nelegebla ». Je la mezo de la 18^a centjaro la ŝtono komence estis enmetata en la internan muron de la preĝejo antaŭĉambro kaj poste (1862) ĝi estis starigata proksime je la murego de la tombejo sub protekta tegmento laŭ la antikvenorda stilo. (Fig. 1.)

La ŝtono estas bela bloko el helgriza, malglateta granito, 2,5 metrojn alta super la tero. Kaj la larĝaj kaj la mallarĝaj flankoj estas ebenaj kaj oportunaj por almeti enskribaĵojn, tiel ankaŭ la superaĵo. Ili estas ankaŭ konsciencie uzitaj. Preskaŭ la tuta ŝtono estas litere, de supre teren, kovrita de runoj kaj sekretaj signoj.

La enskribaĵo de la antaŭa flanko estas farita per varianto de la 16-litera skandinava runaro (*), kiu estas ofte nomata Rök-runoj. (Fig. 2.) Sur la malantaŭa flanko oni ankaŭ trovas gotajn 24-literajn runojn (*). Plue ankaŭ tute specialaj runoj kaj sekretaj signoj troviĝas. Pripensante ke la vortoj ne estas skribataj aparte, oni certe konsentos, ke la deĉifrado de la Rök-ŝtona enskribaĵo estas vera scienca grandfaraĵo.

Plej maldekstre sur la antaŭa flanko ni trovas du liniojn, de malsupre supren legotajn, kies pli granda alteco de la skribitaj signoj montras, ke la « gratisto » volis precipe akcenti tiun parton de la enskribaĵo. Se la runoj estas anstataŭitaj per latinaj literoj laŭ fig. 2, oni legas tiun parton jene :

aft uamuth ŝanta runak thak
in uarin fathi fathik aft faikian sunu

Por fonetika redono de la tiama sonriĉa lingvo ne malmulte da pluj signoj estus bezonaj (*).

Laŭvorte svedigitaj tiuj linioj iĝas : « Efter Wamod stà dessa runor. Minnesgod fader ristade dem efter döende son. » La lingvo do tre aliĝis post tiu tempo. Tiuj vortoj signifas Esperante : « Pri (t. e. kiel memoraĵo de) Wamod staras tiuj runoj. Memorema patro gratis ilin pro mortonta filo. »

La traduko de la daŭrigo estas : « Ni rakontas al

ĉiuj homoj la rakonton pri tio, kio estis la du batalaj rabaĵoj, kiuj estis akirataj, ambaŭ unufoje, de apartaj viroj. »



FIG. 1a — LA ŜTONO KAJ ĜIA NUNA ĈIRKAŬAĴO.

Ni trovas, ke la traduko estas preskaŭ tiel malfacile komprenebla kiel la originalo kaj bezonas pluan klarigon. La plej akceptebla senco estas : « Unu viro venkis pliajn kontraŭulojn kaj per tio akiris samtempe du apartajn batalrabaĵojn. » Tiuj linioj do enhavas tre koncentrigitan citadon en formo de enigmo, kiu tre plaĉis al niaj prapatroj, de unu el tiuj multaj legendoj, kiuj migradis de lando al lando, de popolo al popolo, kaj kiuj estis tre signifaj parto de la literaturo de la antikvuloj.

Eĉ estas konata legendo, kiu povas esti aludita, nome la rakonto pri Valter kaj Hildegunn.

Tiuj du gereĝidoj, kiuj estis fianĉigintaj kun interkonsento de siaj patroj, estis fordonitaj al Attila, reĝo de la Hunoj, kiel gegarantiuloj. La mallibereco ŝajnas al Valter tro longa. Ian tagon li forkuras, kondukante kun

si sian fianĉinon, kaj kunportante la reĝan trezoron de Attila. Persekutita de dekdu viroj, elsenditaj de Attila, li eldanĝerigas Hildegunn'on kaj kaŝas la trezoron en montan fendegon, kaj rajdas kontraŭ la persekutantoj. La vojo estis mallarĝega, kio donis al Valter la profiton povi kunbatali po unu. Li sternis teren dekunu; la dekdua, la estro, forkuras post akra batalo. Tiel la heroo do, per honesta batalo, dekdu fojojn samtempe gajnis du rabaĵojn de dekdu apartaj viroj. Lia rabita duobla trezoro per tio nobliĝis, fariĝinte laŭ la esprima maniero de la pragermanaj popoloj « valrof » — batala rabaĵo. Tio devis esti akirata sur la batalkampo kaj ordinare konsistis el kiraso, armiloj kaj ornamaĵoj de la venkito. Atentu, ke tiuj ĉi popoloj opiniis ŝtelon la plej honta el ĉiuj krimoj. Kontraŭe estis rigardata honeste kaj inde rabi venkitan malamikon.

YNDRRPITHHIFITN
f u t h a r k h n i a s t . b m l r

FIG. 2a — RUNA ALFABETO.

(*) Komparu la artikolon « La Runoj kaj runaj rakontoj », de J. Lundgren, en la aprila numero.

La restanta parto de la antaŭflanka enskribajo de la ŝtono estas la plej granda rimarkindaĵo de la ŝtono; ĉar ĝi certe koncernas Didrik'on de Bern, tiel laŭditan en legendoj kaj kantoj de la antikveco, kiun la historio nomas Teoderik la granda, gota reĝo en Verona.

«Due ni rakontas, kiu estis la viro, kiu antaŭ naŭ aĝoj venis al la mondo ĉe la Reidgotoj, kaj kiu mortis ĉe ili pro siaj krimoj.»

Por klarigi la sencon de tio estas aldonita strofo en antikvenorda versospeco, kies traduko estas:

«Rajdis Tiodrek, la bravega, sur la bordo de la Reidmaro. Sidas nun armita sur gota iranto (ĉevalo) kun la ŝildo sur la ŝultro, princo de la Meringoj.»

La Rök-ŝtono estas de la tempo ĉirkaŭ 900 post Kristo. La historia Teoderik naskiĝis en 454. La gratisto do estus kalkulinta duonan jarcenton kiel homan aĝon, kio ne ŝajnas kontraŭdiri la supozon. Kaŭzo pli grava, ke nia Tiodrek estas vere Teoderik la granda, estas, ke antikva angla kanto, «La plendo de Deor», rakontas, ke Teoderik, kiu estas tie ĉi certe la historia gota reĝo, regnis dum tridek jaroj super «Maeringa burg» — la kastelo de la meringoj. Sendube ni do trovis fragmenton de la legendo pri «Didrik de Bern» el la ventega kaj aventurplena tempo de la popolmigradoj, legendo kiu dum la meztempo estis tre konata kaj ŝatata delatuta pragermanlando, kaj kiun ni trovas en multaj formoj kaj kun variaj detaloj, kaj kante kaj prozrakonte. Kiun epizodon la strofo aludas, ni ne certe scias. Eble tiu parto de la legendo estas konservita nur en tiu ĉi enskribajo. Ni scias, ke parto de la suda bordego de la Balta Maro dum la antikveco estis nomata Reidgotaland. Eble la Reidmaro de la enskribajo estas la nuna Balta Maro. Tiaokaze la strofo de la enskribajo povus esti elprenita el la parto de la Didrika legendo, kiu traktas la vojaĝon de Teoderik Holstein'on por venĝi al Vidga la morton de sia frato Teodemar.

La enskribajo de la larĝa malantaŭa flanko rimarkigas sin per granda riĉeco de signoj. La Rök-runoj tamen ankaŭ tie ĉi kovras la plej grandan parton. Sur la plej supra parto (fig. 4) troviĝas krucformaj sekretaj signoj (branĉaj runoj) de tre malsimpla speco, sed kies ŝlosilon oni prosperis trovi. Tiu mirigaj signoj donas la vorton runimathk — runmajstro. Pli malsupre ni revenos al tiu vorto. La plej supra de la tri horizontalaj linioj

(fig. 4.) komencas: a i r f b f r b n h n f... tute neelparoleble. Sed se ni anstataŭigas ĉiun runon per la sekvanta en la «runlinio», oni trovas s a k u m u k m i n i. Tio estas la sama sekvo de signoj, kiun ni tradukis pli supre per: «ni rakontas al ĉiuj homoj...» Oni trovis ne malpli ol sep apartaj specoj da runoj kaj da sekreta skribo.

Ankoraŭ oni ne estas povinta deĉifri la tutan enskribajon de la malantaŭa flanko. La pli granda parto de ĝia enhavo estas la sama denombro de fragmentoj el legendoj tiam ĝenerale konataj, kiun ni trovis sur la antaŭa flanko. Pri la aluditaj okazoj ni nenion scias.

La supra supraĵo ne estas ankoraŭ deĉifrita kun certeco. Oni povas legi per Rök-runoj la oftan antikvesvedan nomon Biari. Provo estas farita legi la restantajn signojn laŭ ordo ŝanĝita, tiel ke la supra enskribajo, kune kun la jam priskribitaj sekretaj signoj plej supraj sur la malantaŭa flanko, donas traduke: «Biari en Öja estas la runmajstro.» Ne malproksime de la ŝtono troviĝis loko, kies nomo sur malnovaj kartoj estas skribita Öjan.

La enhavo de la Rök-ŝtona enskribajo estas tiel egale unustara kiel la multeco kaj multespececo de la signoj. Kial estas almetita tiu enhavisto el antikvaj kantoj kaj legendoj, kaj kiun interligon ili havas kun la ĉefa celo de la ŝtono, evidente memoriga? Tiu de-

mando estas diversmaniere respondita.

Laŭ unu supozo ili povas esti fragmentoj de la honora kanto, kiu estis farita por esti recitata dum la funebra festo. Vamod do estis opiniata kiel la ido de la herooj kaj batalistoj nomitaj en la enskribajo. La patro volis honorigi sian frue mortintan filon per la rakonto pri lia fiera origino, pri la laŭditaj herooj, kies ecojn li heredis, kaj kies sango fluis en liaj vejnoj. Por la nordaj antikvuloj tio ne estis nur malplena fanfaronado: estis por ili certa atestaĵo pri la potencaj fortoj, kiuj dormetis en la ido kaj kiuj, kiam la tempo venos, devos per la neceseco de natura leĝo montri sin per imponaj grandfaraĵoj.

Eblo alia inter pluj estas la sekvanta. En la komenco de la enskribajo ne estas nomata la memorema patro, kiu faris la luksan enskribajon kiel memoraĵon pri sia mortonta filo Vamod. Nur en la «branĉaj runoj», sur la supra supraĵo kaj la supra parto de la malantaŭa flanko, estas citata la nomo



FIG. 3a — ANTAŬA FLANKO.

de la gratisto: Biari, la runmajstro. Estas do Biari, kiu starigis la ŝtonon pri sia filo Vamod. Estas li, kiu kun fiero memkono montris al sam-kaj posttempa mondo, kian profundan kaj vastan konon li havis en la runsaĝegeco de antikvaj kaj tiamaj tempoj — ni antaŭe ja vidis ke li donas ekzemplojn de ne malpli ol sep apartaj specoj kaj uzoj de runa skribaĵo. Li ankaŭ volis doni ekzemplan liston de la multaj antikvaj legendoj kaj kantoj, kiujn li havis sur sia repertuaro. Li estis poeto je la origina signifo de la vorto, legend-rakontisto kaj deklamisto.

Eble ŝajnas al leganto, ke la ŝtono tiel fariĝas memoraĵo pli pri la gratista patro ol pri la mortinta filo. Jes, sed okazis dum tiu tempo, sufiĉe ofte, ke la vivantoj mem prizorgis siajn tomb-ŝtonojn. Tiel oni legas sur bela runŝtono, kiu estas nun starigita sur la korto de la muzeo por nordaj antikvaĵoj en Upsala, la sekvantajn vortojn:

«Vigmund, la treege artesperta viro, gratigis tiujn ĉi runojn pri si mem. Dio helpu la animon de Vigmund, la ŝipestro.»

Kiel finiĝo de tiu artikolo pri la senkompare plej rimarkinda el la nordaj runŝtonoj, kelkaj vortoj devas esti dirataj pri ĝia grandega literaturhistoria signifo. Eĉ se ni ne havus aliajn pruvojn, ni per tiu sola enskribaĵo povas certe scii, ke Svedujo havis literaturon, forme kaj enbave similan al tiu, kiun la Norvegoj kaj Islandanoj konservis en la laŭditaj Edda-kantoj, kaj al tiu, kiu por la dana meztempa historiisto, Sako Grammaticus,

estis unu el la ĉefaj fontoj por tia granda verko pri la historio de Danujo. Kaj tre rimarkinde ankaŭ estus, se la Svedoj, kiujn jam Tacitus je la komenco de nia tempkalkulo nomas kiel popolon potencan per viroj, armiloj kaj ŝiparoj, kaj kiuj, laŭ la serĉadoj arkeologiaj, dum jarmiloj havis la plej vivajn interrilatojn kun siaj najbaroj, se tiu popolo nur estus ricevinta impresojn de la materia kulturo de tiuj najbaroj, ne de la spirita. La sveda reĝlando sendube estis la plej frue unuigita de la nordaj regnoj, kion norvega scienculo antaŭ ne longe forte deklaraciis, kaj tiu regno vidis, inter siaj limoj, sciadon, literaturon kaj arton florantajn — tion ni certe scias; kaj nuntempaj scienculoj troviĝas, kiuj opinias, ke la konservita norvegislanda literaturo nur estas la postflorado de lingva arto, kies preskaŭ ĉiuj produktoj estas perditaj, kaj kiu, dum la popolmigrada tempo, atingis sian plej riĉan floradon en la pli frue unuigitaj, kaj de la naturo pli favoritaj, nordaj regnoj: Svedujo kaj Danujo.




FIG. 4a — MALANTAŬA FLANKO.

Ĉefe laŭ artikolo de profesoro
O. VON TRIESEN en *Jarlibro de la*
Sveda Turista Societo, 1906,

por «TRA LA MONDO» esperantigis,
HARALD SKOG,
el Falun (Svedujo).



Enketo pri Enketo. — Premioj.

Al la jam cititaj organoj (maja n^o) ni devas aldoni la jenajn: «**Japana Esperantisto**», kiu nin sendis 10 seriojn el 3 sinsekvaj n^oj kaj 10 el 2 malsimilaj specimenoj; «**Brazila Esperantisto**», kiu proponas 3 jarajn abonojn, kaj «**Esperantisten**», kiu nin sendis 10 kolektojn de la 1906^a j.

Ni estos feliĉaj diskonigi niajn bonegajn kunfratojn, kiuj, siaflanke, respondis afable al nia alvoko. Ni povas ankaŭ sendi apartajn spec. Peti ilin *per poŝtkarto, kun respondkarto* (sen adreso sur la responde karto) pro la poŝtelspezo.

Kiel ni ĝin anoncis «**Japana Esperantisto**» pliampleksiĝis. *nuna prezo: 4 fr. anstataŭ 2,50.* La 1^a kaj 2^a n^oj de la dua serio estas tre atentindaj; en la 2^a, interesa artikolo bele ilustrita pri Tokia industria ekspozicio, kaj multaj legindaj sciigoj pri la japana movado; bela parolado de D^{ro} Kroita ĉe la fonda kunveno de la Kiota societo.

«**Brazila Esperantisto**» enhavas ŝatindajn pecojn el la nacia literaturo. En la lasta n^o, ĉarma originala rakonto: Reviviĝo de l' amo, de S^{ro} Murillo Furtado, kiu reprezentis Brazilujo ĉe la Geneva Kongreso.

Blazonŝildo Esperantista.

La 2^a modelo proponita (Aprila n^o) triumfas per 17 voĉoj. Unu sola persono: S^{ro} Esno (Rusujo) elektis la 3^{an}, kaj 2 personoj: S^{roj} A. Schmidt kaj E. Dejean (Francujo), la 4^{an}. Fine S^{ro} Brunet Ch. sendis kuriozan modelon *internacian*: kapo (supro), *pola*, pro nia majstro; flankoj: *anglaj* ĉe la supro, *flandraj*, *hispanaj*, *germanaj* kaj *portugalaj* malsupre; fine la pinto estas *franca*.

Kvankam ni ne promesis premiojn, ni disdonos la jenajn:

- 1^e — 3 sinsekvaj n^oj de «**Japana Esperantisto**».
- 2^e — 1 jaro (1906) de «**Esperantisten**».
- 3^e — 1 trimonata abono al «**Ĉasopis Ĉeskieh Esperantistu**».

S^{ro} Baissac, la instiginto de la alvoko blazonŝildoj; S^{ro} Brunet, pro lia elpensemo; kaj S^{ro} Dejean, pro la interesaj priprenoj akompanantaj lian voĉdonon, ricevos tiujn premiojn. Ili konigu sian preferon, *aldonante 25 c.* por la poŝtaj elpezoj, kaj estos kontentigataj laŭ la supra vico.

Sokolaj festoj en Praha.

Originale verkita por « Tra la Mondo » de V. RIEGEL (Bohemujo).

Unu el la plej signifaj institucioj bohemiaj, fonditaj dum la longjaraj politikaj bataladoj por regajno de la libereco, estas la institucio de la Sokolaro, kiu nunjare, de la 28^a ĝis la 1^a de julio, elmontras antaŭ multenombra bohema kaj fremdlanda ĉeestantaro, jam la kvinan fojon, sian multnombrecon, sian forton, junulan belkreskon, kaj nacian rierecon.

La fondintoj de la ideo de la Sokolaro estis du noblaj viroj Fügner kaj Fyrs, kiuj, en jaroj de la nacia malforteco, fondigis laŭ francaj kaj germanaj modeloj, societojn de Sokoloj, kies tasko estis: edukado de viroj, plifortigo de korpoj kaj vekigo de nacia konscio. La unua sokola societo estis « Sokol Prazsky » (Sokol de Praha), kiu, nunjare, solenas jam sian 45-jaran jubileon, de sia fondiĝo. Koncerne la edukadon, plenumas la sokolaj societoj sian taskon same kiel en Francujo la gimnastoj, kaj en Germanujo la turneroj. Sed la bohema Sokolaro havas pli grandan signifon. Ĝi prenis sur sin la ĉefan taskon vekigi la nacian animon, konstrui-sub standardo de bohema demokratismo (Sokoloj titolas sin reciproke « fratoj ») — bone organizitan armeon el viroj posedantaj puran patriotismon kaj burĝan honestecon. La amo kaj favoro de la nacio por la Sokolaro ĉiam pligrandiĝadis kaj precipe plaĉis al ĝi forta, bonvola obeemeco en la plej bona senco de l' vorto, subiĝo, oboe garantiita per vira vorto.

La perfekteco kaj korpa lerteco de bohemiaj sokoloj estis ankaŭ en la fremdlando multfoje montrita, ekz. per brilaj venkoj, kiujn gajnis la sokolaro sur francaj luktejoj.

Hejme estis la forto kaj multnombreco de la sokolaro jam kvinfoje elmontritaj en festaj kunvenegoj, kunigitaj kun grandaj publikaj vetadoj kaj gimnastikadoj.

Interesa estas la statistiko de tiuj festenoj: la unua estis aranĝita la 18^a de junio 1882 okaze de la 20-jara jubileo de la fondiĝo de la societo « Sokol de

Praha ». Tiam gimnastikis samtempe 700 viroj. La dua festo estis aranĝita en la jaro 1891^a (27-30 de junio) okaze de la jubilea ekspozicio bohema en Praha. Samtempe gimnastikis 2500 viroj. La trian feston, je l' okazo de la bohema etnografia ekspozicio (28-30 de junio 1895) partoprenis 4271 komune gimnastikantoj. La kvaran festan kunvenegon de la Sokolaro en la jaro 1901 (28-30^a de junio kaj 1^a de julio) ĉeestis 6500 gimnastikantaj viroj, 800 virinoj kaj 1700 junuloj.

La nunjara, kvina festo sokola superos ĉiujn antaŭajn tiel per la nombro de gimnastikantoj (8000), kiel per la granda festena konduko, enhavanta pli al 20000 da sokoloj.

La grandecon de la sokolaro montras la jenaj ciferoj: la centra organizacio sokola, enhavanta 671 societojn, nomata « Unuiĝo de bohemiaj sokoloj » (Česká obec sokolská) havas 52.169 membrojn. La ĉefa juratistaro atingis nunjare jam 33 jarkolektojn.


nalo sokola « Sokol » atingis nunjare jam 33 jarkolektojn.

La nunjaraj sokolaj tagoj fariĝos grandaj festoj ne nur por la sokolaro mem, sed ankaŭ por la tuta nacio kaj la tuta mondo slava.

La gimnastikadon partoprenos ankaŭ multaj fremdlandaj delegitoj de la gimnastikistaj federacioj precipe el Francujo, Svisujo, Belgujo kaj Italujo.

La Bohema Esperantistaro aranĝas je l' okazo de tiuj festaj tagoj kunvenon de partoprenantaj Esperantistoj.

V. RIEGEL
el Praha.



J. U. D. JINDRICH VANICEK, ĈEFULO DE LA « UNUIĜO DE BOHEMAJ SOKOLOJ. »

(1) « Tra la Mondo » tutmonda gazeto en Esperanto, kun multaj ilustraĵoj. Artikoloj pri ĉiuj landoj, aparte pri Bohemujo. Jare 8 K. Esperanta Librejo de F. Topič. Praha-I. Ferdinandova 11.

LA SOKOLAJ FESTOJ DUM 1907.

Ili okazis grandsukcese, kiel ĝi estis antaŭvidita, meze de la plej granda entuziasmo de la Bohemoj.

Inter la fremdaj vizitantoj estis reprezentantoj de la franca gazetistaro kaj de la urbo Paris', kies ĉeestado instigis manifestaciojn de simpatio de longe ekzistanta inter Francoj kaj Bohemoj.

La esperantistoj de Praha utiligis la festojn por sia senĉesa propagando.


Rilate tiun ĉi ni ricevis la jenajn sciigojn de S^{ro} V. Riegel, kunlaboranto de « Ĉasopis Českých Esperantistu »:

En la « *Unuiĝo de bohema-slava studentaro* » estas fondita rondeto de studentoj-esperantistoj, kies celo estas diskonigi

inter la Bohema studentaro nian lingvon, kaj interrilati per Esperanto kun fremdlanda studentaro.

Gravan dokumenton pri la utileco de la uzado de Esperanto presis la Bohema ĉiutaga gazeto « Ĉas », kiu en la numero de la 14^a de majo publikigis artikolon verkitan Esperante de nia samideano Arvo Linturi en Rauma (Finnlando) kaj tradukita en Boheman lingvon de S^{ro} V. Riegel. En la artikolo estis korektigitaj kelkaj malĝustaj publikigitaj en alia Bohema gazeto pri finnaj liberigaj penadoj. Tiamaniere Esperanto fariĝis interrilatilo inter Bohemujo kaj Finnlando.

Ses Bohemaj ĉiutagaj gazetoj raportas ĉiam pri Esperantaj aferoj en Bohemujo. Tiel ekzemple pri la vizito de gesinjoroj Evtstifeiff raportis *kvaz* bohemaj ĉiutagaj ĵurnaloj.



LA KOMUNA GIMNASTIKADO.

Dum la IV^a festo Sokola en la jaro 1901.



ĈIRKAŬMONDA VOJAĜO EN KVARDEK TAGOJ.

La angla leŭt^o kolonelo Burnly-Campbell ĵus starigis la rekordon pri la ĉirkaŭmonda vojaĝo en 40 tagoj, laŭ la jena horaro: deiro de Liverpool' la 3^{an} de majo je 7^h 20 vespere, alveno ĉe Québec' la 10^{an} de majo 3 h. posttagmeze kaj deiro de tiu urbo du horojn poste, por alveni en Vancouver' la 11^{an} de majo je 5 h. matene. Je duonhoro posttagmeze, la ŝipo al Japanujo surportis la kolonelon, kiu elŝipiĝis ĉe Jokohama' la 26^{an} frue. Post matenmanĝo ja meritita kaj kvietita, la glob-trotisto resuriris la vojon, trapasis Tsagura' la 28^{an} kaj alvenis en Vladivostok la 30^{an} de majo je 2 h. 15 vespere.

La transsibera vagonaro estis tuj forironta; li ĝin utiligis kaj alvenis en Irkustk' la 4^{an} de Junio. La 10^{an}, Moskvo' vidis dum kelkaj horoj la vojaĝanton, maltrankvile atendantan la deiron de l' rapida vagonaro al Berlin'.

Tie li estis la 12^{an}; la 13^a je 11 h., li forlasis Ostend', kaj la saman tagon alvenis en Dover' je 2 h. 50. Li estis fininta sian kuradon ĉirkaŭ la mondo havante nur veŝtokeston, gladstone-bag, razinte sin ĉiutage per mehanika razilo, kaj elspezinte 3.750 fr. (1500 sm).

FELIETONO

La Specialistoj.

Tradukita el la Holanda lingvo. (1)

La suferanto rakontis pri la granda vundo, profunda je 6 centimetroj kaj longa je 35 centimetroj, ne malzorgante rimarkigi, ke la dormigilo ne helpis lin, ke li estis vidanta kaj sentanta ĉion, tolerante ĉion sen plendoj, nur ĉar li sciis, ke li devas vivi por la borso!

Tiu ĉi intervjuo havis sukceson. La tuta eldono de la gazeto estis vendita post unu tago.

La portretoj de D^o Kidder kaj Cutter estis en ĉiuj butikoj. Ilia sanigilo vendiĝis milope.

Tiam venis la deziro ĉe Soft, vidi sian portreton mem sur la bultenoj gluitaj sur murojn kaj kioskojn. Mem li volis aŭdi la publikan opinion. Kaj kial ne? La kuracistoj permesis lin manĝi, kaj nun li manĝis tiel multe kaj tiel sammaniere, ke li certe estas resaniĝinta. Ilia rimarko, ke la vundo ne estas jam tute fermiĝinta, ŝajnis al li vola trograndigo. Se ĉio irus tiel rapide, ili kompreneble ne povus postuli altan pagon. Tia bona negocisto li ja estas, ke li komprenas tion.

Ivespere, kiam la malsanulistino estis foririnta unu momenton, li prudente malfirmigis la grandan kompreson. Tre lerte li forprenis la ĉarpion. Kiam la lasta peceto estis forprenita, li ne jam estis trovinta la vundon. Li serĉis.... sed nenion trovis. Komence li kredis, ke li estas freneza, sed iom post iom la konvinko venis, ke la du kuracistoj estas lertaj trompeguloj. Li pripensis, kaŝis rapide la ĉarpion kaj firmigis la kompreson kiel eble plej bone. Kiam la malsanulistino venis, li ĝemis pro doloro. Ŝi skuis liajn kusenon kaj konsolis lin komparte. Nokte li pripensis, kiamaniere sin venĝi: li petos pri la kalkulo, diros ke li estas tre kontenta kaj volas pagi. Tuj kiam li havos la paperon, li saltos el la lito kaj diros: « Ho, trompeguloj, ĉu vi volas monon? nun! Mi scias ĉion kaj mi sciis ĉion; jen estas la kalkulo, kaj vi ne ekhavas unu cendon! Sed mi publikigos vian agon! »

La nuligotan kalkulon li ĵetos al la ŝtelistaj vizaĝoj. Tio ĉi al li ŝajnis la plej bona.

Kiam D^o Kidder kaj Cutter matene vizitis lin, rakontis la malsanulistino, ke li havis tre malkvietan nokton kaj ke li dormis tre malbone. La kuracistoj palpis lian manradikon kaj donis sanigilon. Tiam li diris mallaŭte:

— D^ooj, mi volus diri ion al vi! Mi estas tre kontenta. Via kuracado estis bonega, sed mi malŝatas ŝuldojn. Ĉu vi volas doni al mi vian kalkulon?

— Ni havas tempon », respondis D^o Cutter.

Sed D^o Kidder rapidege respondis: « Se vi ĝin volas! Vi ŝuldas al ni 10000 dolarojn.

— Ne pli? demandis la suferanto.

— Ne, generalo, ĉu ni helpas vin aŭ alian personon, ni nur havas unu prezon.

— Ĉu vi povas skribi kalkulon tie ĉi?

— Plezurege, generalo! »

La malsanulistino alportis inkon kaj plumingon kaj D^o Kidder skribis la kalkulon sur paĝon de sia notlibreto kaj donis ĝin al la malsanulo.

S^o Soft legis ĝin dublaŭte, faldis la paperon, ŝiris ĝin nerapide, saltis el la lito kaj diris laŭte:

« Ho, trompegistoj, ho, ŝtelistoj! »

La malgranda D^o Cutter kaŝis sin en angulon de la ĉambro, sed D^o Kidder ne faris kiel li. Li skuis siajn harojn kaj diris indignante: « He! he!

— Trompuloj, trompegistoj, mi diras, kriis la malsanulo, malhonestaj, perfidaj trompegistoj! »

D^o Kidder kviete metis seĝon apud la malsanulon kaj diris: « Sidiĝu, generalo. Ne krii tiamaniere, ĉar vi estus ridinda ».

La kvieteco de tiu ĉi malgrasa viro mirigis la grandegulon.

« Mi, ridinda? li demandis.

— Treege! »

La malsanulo sidiĝis kaj rigardis konsternite.

« Parolu kviete, diris D^o Kidder, prenante seĝon por si mem. Mi ne operacis vin, sed mia kuracado tamen sanigis vin. Vi estas proimaga malsanulo. Vi vizitis D^{on} Bull kaj tiu tre lerta kolego diris al vi, ke vi ne estas malsana. Tiu ĉi certigo de klerulo devis sufiĉi al vi, sed vi volis esti pli saĝa kaj venis ĉe nin. Fantazio estas pli danĝera ol 40 gradoj da febro! Se mi ne estus resaniginta vin per ŝajna operacio, vi sendube iĝus malsanadulo kaj ekhavas malsanon pro viaj pripensoj. Tiam vi ne povus praktiki viajn negocojn, kaj via abomena kaprico kostus al vi pli multe ol tio, kion ni petas nuntempe. Estu justa, ni zorgis vin bonege.

— Sed.... rediris la riĉegulo.

— Ne interrompu, tio estas nur unu flanko de la okazo. Mi trompis vin, laŭleĝe mi estas trompegisto, sed pripensu, kion kostos al vi la publikigo!

Malsanulo estas simpatia, malsanegulo estas pli simpatia. La tuta amerikana nacio nun amas vin pro via malfeliĉeco. Se vi skribus en la gazetojn, ke vi ne estis malsana kaj ke vi, kiel idiotulo, estis mortanta dum du semajnoj, pro vundo je 35 centimetroj, ne havante ĝin, vi suspektigos min, sed vi mem estos la malspritulo. Al vi la elekto! Aŭ vi pagas kaj mi kuracos vin ĝis resaniĝo, aŭ mi procesas vin leĝe; vi publikigos ĉion kaj ni ambaŭ forkuros pro la publika opinio. Al vi la decido. »

La riĉegulo silentis. D^o Kidder estis prava. Per publikigo li estus ridinda. Fine li diris:

« Vi estas trompegistoj.... sed lertaj!

— Ni konsideras tion ĉi kiel honoron ». Kaj D^{ro} Cutter diris mallaŭte: « Ni estas specialistoj! »
Kiam Louis Soft estis paginta, li vidis la malsanuliston, kiu zorge forigis la boteletojn, kaj li demandis ektime: « Sed, ĉu ŝi nenion diros? — Ŝi estas mia edzino. Ne timu ŝin! » diris D^{ro} Cutter.

D^{roj} Kidder kaj Cutter daŭris vendi siajn medikamentojn, famiĝis kaj ĉiu konstruigis belegan domegon.

J. H. SALOMON.
Holandano.



Mia plej bela aventuro.

Okazintaĵo nur parte kaj malĉefe vera.

Se antaŭ 50 jaroj mi estus estinta bicikletisto, tio, pro diversaj kialoj, eble iomete mirigus; sed al la nuntempularo tio ĉi ne povas ŝajni miraklo. Mi estas eĉ pasia bicikletisto. Ĉio tio estus nur flanka afero, se ĝi ne havus la ĉefan rolon en la sekvonta rakonto.

En belega printempa tago, kiun la — mi preskaŭ dirus « Suno Hispana » — ora suno bavara ensorĉa briligis, mi ruligis memkontente mian bicikleton « Tra la Mondo », celante la verdstelujon. Subite miaj okuloj ekvidas antaŭ mi, en la fosaĵo apudvoja, junan kaj ĉarmoriĉan bicikletistinon, kies vojaĝilo sendube ekstrikis laŭ nuntempa maniero.

Mia simpatio por la belulino juna pligrandiĝas ĝis fajra entuziasmo, kiam mi vidas brili, ĉe l' loko de broŝo, verdan stelon. Tuj mi haltigas mian ŝtalĉevalon kaj elparolas: « Nu, ĉarma samideanino, kial ne « obstine antaŭen »? Kial vi flankiĝis for de « la klara kaj rekta kaj tre difinita... vojo elektita? »

« Ho, kara S^o, plezure mi laŭirus la vojon celitan, se la « batoj de l' sorto », en formo de malica surstrata najlo, ne estus disŝirintaj mian pneŭmatikon. Kaj ve! bedaŭrinde nun mi ne povas helpi min ».

« Nu, aminda fraŭlino, mi estas preta kuraci vian veturilon, se vi promesas al mi kiel kompensajon — tri kisojn ».

Longa silentado, kiun mi fine, pro kvazaŭa embaraso, interrompas per ekrebongado de la biciklito.

Subite ŝi diras: « Se juna fraŭlino sur vasta kamparo estas sola kun sinjoro, ŝi ne devas diri, eĉ kion ŝi pensas ».

Kvankam mi ne rigardas ŝin, mi sentas, ke siajn okulojn ŝi ne movas plej dolĉanime.

« Ho, vi povas sen danĝero diri ĉion laŭvole, estiminda fraŭlino, kaj se vi nomus min eĉ la plej malrespekta viro, mi nur respondus: vi eraras perfekte. »

« Ŝi ŝajnas rideti. Kaj mi daŭrigas: « Vere, tian konfidindan ulon kiel min vi certe nenie trovos, eĉ se la tuta mondon vi trabicikletus ».

« Kion signifas ĉi tio? » ŝi diris ridetante.

« Rigardu min do atente kaj zorgeme kaj baldaŭ vi bone konscios ĉi tion. Mi estas distinginda ano de Esperantistujo, sana, konfeseble beleta, nepre neriproĉinda kaj — ne portas ian ringon, eĉ ne en la vestpoŝo ».

« Ah », ŝi diras gaje, « tio signifas, ke mi... ».

« Pardonon! ke mi », mi interrompas.

« Senkulpigu », ŝi diras konfuzita.

« Tio signifas, ke mi do estas viro tute akceptinda. Unuvorte, mi — nu, vi komprenas min; mi serĉas fianĉinon. Vi do ne kontraŭdiros, ke tio estas tre saĝa ».

« Ne, vi estas tute prava ».

« La pneŭmatiko bezonas ankoraŭ sekigi dum kelke da minutoj ».

« Nu, ni atendu do tie ĉi tiom da tempo ».

Mi flanken metas la vunditan irigilon kaj sidigas kontraŭ la fraŭlinon. Ŝi estas juna, bela kaj ĉarma, ĉi tio diras ĉion.

« Kara fraŭlino, kion vi respondus, se mi prezentus al vi mian koron por la tuta vivo? »

« Sed, sinjoro, vi ja tute ne konas min! »

Kiel bela enigmo de Dio donita ŝi staras antaŭ mi, kaj genufleksante mi admiras ŝin. « Ho, via eksteraĵo ne povas erarigi. Cetere, vi estas ankaŭ esperantistino, tiu ĉi cirkonstanco donas al mi la plej bonan garantion ».

Mi ekprenas siajn manojn kaj ŝi lasas min kisi ilin. Mi forgesas ĉion ĉirkaŭ mi, klinas min al ŝi kaj sentas, ke ŝi metas siajn manetojn sur miajn harojn: « Do, vi volas edziĝi kun mi? »

« Je mia honorparolo — jes! » Kaj pasie mi rabas al ŝi pli multajn kisojn ol la tri kontraktitajn.

Subite ŝi diras: « Sed, sinjoro, vi forgesis ja unu tre necesan cirkonstancon! »

Konsternita mi rigardas ŝian rideteman vizaĝeton kaj ŝi daŭrigas: « Jes, jes, vi ja tute ne scias, ĉu mi estas riĉa aŭ malriĉa! »

« Ho, tio nepre estas malgrava! Mi laboros kiel ĉevalo, mi estas kvazaŭa miniatura giganto; pri laborpovo mi egalvaloras tri normalajn Adamidojn! »

« Sed, mia karulo, vi ja tute ne min demandis jam pri tio. Mi ja ne estas malriĉa! »

Ŝi tremas pro ĝojego; mi sentas ĉi tion ĉe miaj tempioj, kie ŝi metis siajn manojn.

« Mi ja ne estas malriĉa, mi posedas ja patrinan heredon... »

« Da? »

« Da okcentmil markoj ».

« En mia kapo ĉio komencas ĉirkaŭmarŝi kaj rondturniĝi. »

« Ok... » pli multe mi ne povas elbuŝigi.

« Mi estas la filino de bankisto Orŝtono kaj, se vi volas edziĝi min, mi konsentos, jes, mi, alkonsentos, ĉar vi estas la sola, kiu al mi proponas la geedziĝon kaj ne, kiel ĉiuj aliaj, al mia mono ».

« Ho, preskaŭ unu milionon! » Mia spirito forestas. Ĝi promenas en eleganta kastelo de la ĉarmaj montaroj en Bavarujo. Belegaj ĉambroj, ŝargitaj tabloj, delikata ĉampanvino, kaj distinginda gastaro rigardanta al la bela mastrino, kiu propramane kaj kun ensorĉa ĉarmo fruktokorbon alportas. Mi ekrigardas supren, jen ŝi estas ja antaŭ mi, kaj ridetas kaj ĝojas pri tio, ke mi ne povas diri eĉ unu vorteton.

Kaj ŝi genufleksas malsupren al mi kaj kisas min.

* * *

Mia granda feliĉo en tiu momento subite ekŝiĝas, ĉar mia kapo alfrapas la litrandon, kaj mi — vekiga.

Estimata gelegantaro, mi petas, ke vi pardonu. Ĝis nun, mia aventuro ne estas tute vera, tiarilate, ke mi ĝin vidis nur en revo. Male, nepre mi certigas la veron de la jeno: De tiu tago mi serĉas dum ĉiuj miaj bicikletiroj per avidaj okuloj (aŭ, pli ĝuste, vidiga nazumo) en ĉiuj apudstrataj fosaĵoj la belan kaj amindan milionulinon kun la disŝirita pneŭmatiko. Bedaŭrinde mi ne povas trovi ŝin.

Domage! La bela parto de la tuta okazintaĵo ne estas vera, kaj la vera parto ne estas bela!

ZACHERL KARL,
el Passau (Bavarujo).



Jean Jacques Rousseau

juĝita de JULES LEMAÎTRE, franca Akademiano.

Kiel oni diras ofte, *Jules Lemaître* estas unu el la Princoj de la kritikarto. Unue profesoro, rapide li altiris la atenton de la ĵurnalestroj, revuestroj, teatrestroj pro spritaj artikoloj, delikataj versaĵoj, lertaj teatraĵoj kaj originalaj romanoj. Baldaŭ li estis favore konata de ĉiuj inteligentuloj kaj literaturamantoj. Kiel teatraĵa kritikisto, li skribis precipe en la ĵurnalo « Les Débats ». Kiel romanverkisto, li kontraŭbatalis la naturalisman manieron. Ĉe la teatro, grandan sukceson li atingis per la prezentado de « Le mariage blanc » kaj « La Massière ». Forlasinte la tezajn temojn de Alexandre Dumas kaj la fantaziecon de Meilhac kaj Halevy, li priskribis strangajn konsciencembarasojn kaj specialajn kuriozajn flankojn de la societo. Eĉ li estis unu el la estroj de la politika naciista partio. Unuvorte, oni ne povas koni la francan literaturan movadon, ne legante ion de tiu ĉi granda majstro, Jules Lemaître.

Tiun ĉi vintron li faris en la privata ĉambrego de la societo de Geografio, en Parizo, serion el 10 paroladoj pri *Jean Jacques Rousseau*, la fama XVIII-centjara filozofa, kiuj elvekis la atenton de ĉiuj literatur-emuloj, kaj havis sukceson sen ekzemplo.

Ni estas certaj interesi niajn gelegantojn parolante iom al ili pri tiu literatura okazaĵo.

* * *

« Rousseau estas frenezulo, li havas talenton nur kiam li frenezigiĝis; oni devas nek lin resanigi, nek lin insulti. » Per tiuj esprimoj d'Alembert, en sia interkorespondado kun Voltaire, konkludis pridisputadon pri la persono ja eksterordinara, kiu estis J. J. Rousseau.

Li plej altgrade influis sian centjaron (XVIII^{an}), la sekvintan (XIX^{an}), kaj influas ankoraŭ unu el la plej famaj reprezentantoj de la XX^a centjaro : Jules Lemaître.

Jules Lemaître estas spiritposedata de J. J. Rousseau. Li ŝatis lin dum sia juneco : « Mi multe ŝatis lin iam, kiam mi havis pli da iluzioj ol hodiaŭ. » Li ne plu lin ŝatas : « Mi faris eksperimentojn, mi vidis, proksime, realaĵojn, kiujn mi estis nur ekvidinta de malproksime; mi tuŝis per la fingro la konsekvencojn de iaj ideoj de Rousseau. Pro tio, kiam mi promesis paroli pri Rousseau, mi celis studadi lin precipe kiel la patron de kelkaj el la plej profundaj eraroj de la XVIII^a kaj XIX^a centjaroj. »

Li amis lin en sia juneco, ne lin leginte serioze kaj plene; li malamamis lin en sia matureco, ĉiam ne lin leginte; kaj li serĉas, ĉe l' sojlo de la maljuneco, nun post atenta legado, « kaŭzojn por lin kondamni ». Li trovis ilin, sufiĉege, ĉar ili estas en la verko de Rousseau, aŭ, pli ĝuste dirante, ĉar en ĝin li metis ilin. Sed okazis samtempe fakto, kiun li ne estis

antaŭvidinta; li konstatis « ke tiu ĉi homo, aŭtoro de tiom da publikaj malbonaĵoj (tamen ne volinte ilin), sendube estis pekulo kaj fine frenezulo, ne malbonulo sed pli ĝuste malfeliĉulo. » Jen estas lia konkludo: « Mi ŝategis la Romantismon kaj mi konfidis al la Revolucio. Nun malkviete mi pripensas ke la homo, kiu, ne certe sola, sed pli ol iu ajn, faris aŭ preparis la Revolucion kaj la Romantismon, estis fremdulo, senĉesa malsanulo kaj fine frenezulo. Tamen oni lin amis. Kaj mi mem, post tiu longa legado, per kiu mi gajnis oftan plezuron, mi intencas lin forlasi sen malamikeco kontraŭ lia persono, kun la plej vigla malaprobo kontraŭ kelke da liaj ĉefaj ideoj, la plej vera admiro al lia arto strange nova, la plej sincera kompato pro lia malfeliĉa vivado, kaj sankta teruro — laŭ la latina esprimo — antaŭ la grandeco kaj la mistero de lia agado ĉe la homaro. »

Resume, J. Lemaitre, post tiom da aliaj, opinias kiel d'Alembert: « Rousseau estas frenezulo; oni devas nek sanigi, nek insulti lin. »

Poste, la kritikisto en siaj paroladoj ekzamenas « Les confessions », « La nouvelle Héloïse », « Emile », « Le contrat social », k. t. p. Same kiel la historiisto Taine, li precize kondamnas la demokratian socialistan societon, sed per vortoj amuzaj, per spritaj anekdotoj, humorajaj, bubajaj. « Sufiĉe! — Aukoraŭ! Per la Diablo! » Neniam per pli da gajeco, paroladisto eldonis tiel gravajn juĝojn. Oni komprenas, ke li estas la estro preferata de aprobema aŭskultantaro.

J. Lemaitre kontraŭdiras kaj eĉ agrable mokas siajn amikojn Faguet, Lanson, Brunetière, kiuj trovas « Le contrat social » serioza. Kontraŭe li ekvidas en tiu ĉi libro kelkajn simptomojn de frenezeco. Vane, Kant, en « La critique de la raison pure pratique », Paul Janet, Ch. Renouvier, Gabriel Hanotaux eltiris ion el « Le contrat social » aŭ serioze pridiskutis pri la teorioj de J. J. Rousseau; J. Lemaitre opinias ke tiu ĉi verko estas la plej malbona kaj naskis la plej sensencajn kaj mortigajn antaŭjuĝojn de la Revolucio. Sed, laŭ lia kontraŭa diro, « La profession de foi du vicaire Savoyard » estas la plej bela « Credo » de spiritualismo.

La decido de J. Lemaitre, same kiel tiu de François Coppée, estas sekve farita: li havas l' abomenon sakran — laŭ la antikva senco kompreneble — de l' socialista demokrateco. Kia li do estos? Elekti, li ne povas, kaj tion li tre bedaŭras. Pascal kaj S^{ro} de Sacy ne estas plu en tiu ĉi mondo por akcepti lin en « Port-Royal ». Restas nur l' Akademio kaj la naciismo.

Efektive la nova libro de J. Lemaitre pri J. J. Rousseau estas nur pleninstrua pamfleto kontraŭ la Revolucio unue, poste kaj malpli forte, kontraŭ la Romantismon.

La Revolucio estas definitive kondamnata: malsprituloj, krimuloj, pedantoj, la tuta gamo de l' malafablaj epitetoj estas eluzata kiel ĉe Taine. Tion alnomas Lemaitre la tono de parolado *iom zorgita!*

La Romantismon estas iom plie estimata. Pri J. J. Rousseau, iniciatoro de l' granda persona lirapoezio, de l' granda romano malmalmege autobiografia, la paĝoj lertaj kaj fortaj estas sufiĉegaj en tiu bela studado, kie aperas, se oni flankigas la socialismon kaj la naciismon, la multobla animo de J. Lemaitre:

erotika, mistika, idolema, kristana, laŭvice kaj samtempe.

Estas plezuro iri gvidata de la mano fleksebla kaj certa de tia legulo de pensoj, tra la dedalo de la « Confessions », ofte konfuzemaj malgraŭ ia ŝajna sincereco. Tre feliĉa oni estas sciigi, ke J. J. Rousseau kaj Thérèse estis kunigitaj de krimo, de krimo kvinfoje refarita, kaj ke tio estas serioza ligilo. J. Lemaitre forigas la favoran supozon de G. Sand kaj de V. Cherbuliez, ke la kvin infanoj ne naskiĝis el Rousseau, kvankam li ne ĝin tute malakceptas. Vane, Lemaitre deziras esti indulgema, li ne povas akcepti, ke junulo, frenezema, malpurajema, malhumilema, prenis la titolon de reformisto de moroj kaj de profesoro de virto, kaj ke li skribis paroladon virtplenan, — tiel virtplenan! — pri la putriĝo de l' moroj per la sciencoj kaj la artoj. Oni sciigas ankaŭ plezure, ke la Dijon'a Akademio, konsistanta el tre honestaj personoj, estas, laŭ la ironia diro de l' kritikisto, sola responda pri « Le contrat social » kaj sekve pri Marat, pri S^t Just kaj Robespierre, « escepte se estis en tiu Akademio iu viro speciale malvirta, kiun ni neniam konos ».

Alia fakto: en 1760 Rousseau renkontas sur la aleo de l' kastelo, Amélie de Boufflers, tiam deknunjaran, nepinon de Marŝalino de Luxembourg; nenion sciante diri al ŝi, li proponis kison, kiun la infanino ne rifuzis.

Kaj Lemaitre aldonas senkompatate:

« Se oni rememorigas rapide la misteran fatalan ligilon de l' efikoj kaj de la kaŭzoj, ĉu diri: « Tiu kiso, donita al la juna Amélie de Boufflers, estis jam la kiso de gilotino », estus nura deklamo? Post tridek tri jaroj efektive, Amélie de Boufflers, dukino de Lauzun, estis mortkondamnata de viroj, kiuj estis fervoregaj ŝategantoj de Rousseau. »

Ĉiuj verkoj de l' filozofo, iom post iom, estas komentariataj laŭ tiu ĉi satira maniero, kaj post la aŭskultado aŭ la legado de J. Lemaitre, ni pensas scii ion plian, ol kion ni sciis post la nura legado de J. J. Rousseau. Ekzemple, ni precize konas la rilatojn inter J. J. Rousseau kaj S^{ino} d'Houdetot, ĉar Rousseau nur komprenigas, kaj Lemaitre ĉiam precizigas. Dank' al mano lerta de ĥirurgiisto, kutiminta por tiaj laboroj pri Psikologio patologia, la paroladisto elartikigas la mensogojn de J. J. Rousseau kaj montras inde la fiziologiajn kaŝitajn makulojn de l' eminentulo. Kaj tio, li diras, ĉion klarigas aŭ en la « Nouvelle Héloïse », aŭ eĉ en « L'Emile ».

J. Lemaitre pretendas forlasi la detalojn kaj tion, kion Rousseau nomas « la Labirinto malluma kaj ŝlima de siaj konfesoj »; sed, ĉar necese estas malkovri la veron, li donas precizajn detalojn tie, kie Rousseau deziras ion kaŝi.

Tio ne estas la flanko malplej kuriozinda de tiu kurioza komentario. Resume, por kiu ne legis la konfesojn kaj aliajn verkojn de J. J. Rousseau, la libro de Lemaitre estas uzebla enkonduko; kiu ilin legis, trovas en ĝi detalan resumon, kiu klarigas multajn ĝis nun mallumajn punktojn, per helega lumo. Mallongige, por kiu volas studi J. J. Rousseau, necese estas la kritiko de J. Lemaitre.

Profesoro BUQUET,
el Beaune.



EKSTERA VIDAĴO DE LA SCIENCA OFICEJO.
La 10 teretaĝaj fenestroj apartenas al la Oficejo.



RENÉ DE SAUSSURE.
Direktoro de la Scienca Oficejo.

La Internacia Scienca Oficejo Esperantista en Ĝenevo, Svislando.

Dum la lasta Universala Kongreso de Esperanto ekfondiĝis *Internacia Scienca Asocio Esperantista*. Generalo Sebert, membro de la Francuja Instituto, estas elektita kiel prezidanto de la dirita Asocio, kaj D^{ro} Carlo Bourlet kiel ĝenerala sekretario. La ĉefa celo de la Scienca Asocio estas la disvastigo per komuna agado de la uzado de la lingvo Esperanto en la sciencajn rondojn, gazetojn, societojn kaj kongresojn; alia grava celo de la Asocio estas la metoda ellaborado de l' teknikaj vortaroj. Sed por trafi tiujn celojn estis necese krei centran oficejon por interrilatigi la anojn de la Asocio kun ilia estraro; la urbo Ĝenevo estas elektita kiel sidejo de tiu konstanta oficejo.

Post interkonsento kun la nuna estraro, D^{ro} R. de Saussure starigis kaj organizadis tiun oficejon en la teretaĝo de

l' N^o 8a, strato Bovy-Lysberg (kontraŭ « Victoria Hall », la kunvenojo dum la Ĝeneva kongreso). La bildo montras la eksteran ŝajnon de la Scienca Oficejo (Victoria Hall staras dekstre, ekster la rando de l' fotografajo).

La nuna oficistaro konsistas el kvar personoj; D^{ro} de Saussure, kiel direktoro, Sr^o H. Hodler kiel sekretario, Sinoj Rieder kaj Emery kiel oficistinoj. Krom tiu konstanta oficistaro, du redakciaj sekretarioj (S-oj P. A. H. Muschamp kaj Th. Renard) alportas sian helpon por la redaktado de *Scienca Revuo*, kiu fariĝis la oficiala monata organo de l' Scienca Oficejo depost la 1^a de Januaro 1907. Fine la Scienca Oficejo estas helpota de *Ĝeneva Helpa Komitato*, konsistanta el ĉirkaŭ 50 diversfakaj sciencistoj. Tiuj specialistoj, el kiuj dudeko estas profesoroj ĉe la Ĝeneva universitato, promesis sian helpon por la ellaborado de la teknikaj vortaroj; ĉar estas verŝajne, ke la Scienca Asocio starigos Internacian Komitaton por elekti kaj fiksi kiel eble plej baldaŭ la multajn teknikajn esprimojn bezonatajn de l' sciencistoj kaj pli ĝenerale de ĉiaj specialistoj. La laboro de tiu komitato estos ĉirklere farata kaj alcentrigata en la Scienca Oficejon, kiu tiamaniere interrilatigos la anojn de l' internacia komitato; la tasko de la Ĝeneva komitato estos do: diskutadi la respondojn ricevitajn de la diverslandaj komitatoj, klasigi la akceptitajn vortojn (1) kaj prepari la tabelojn de la novaj esprimoj proponataj kaj diskutotaj.

Ĝis nun la Scienca Oficejo okupadis sin ĉefe dissendante ĉirkleron por konigi la celon de la nova Asocio kaj por ricevi la aliĝon de kiel eble plej multaj specialistoj antaŭ la 3^a Universala Kongreso. La nomaro de la aliĝintoj estas publikigita ĉiunmonate en *Scienca Revuo*.

H. K.



PARTO DE LA INTERNO DE L' SCIENCA OFICEJO.
Sr^o René de Saussure Sr^o H. Hodler.

(1) La elektitaj teknikaj vortoj estos klasigitaj laŭalfabete sur apartaj kartetoj konservotaj en specialaj tirkestaj mebloj ĉe la Scienca Oficejo.



TRA LA MODO

Ĉar estas nenio nova por diri pri la kostumoj mem, mi parolos hodiaŭ pri la akcesoriaĵoj de la tualetoj.

Inter la plej necesaj al elegantulino troviĝas la ĉarmaj brustkovriloj, kravatoj kaj falbaloj el neĝblanka silkotlajo tre delikata. Tiuj ĉi falbaloj borderitaj per dubelflavaj puntetoj el Alençon, veraj aŭ imititaj estas sulkigitaj aŭ falditaj kaj uzataj por fari diversajn ornamilojn: kravatojn, punftaldajojn, k. a.

Nun aperas por la marbordo, muslinaj kaj gazaj skarpoj kun floroj presitaj, pentritaj aŭ broditaj, kiuj revenigas en la penson la skarpojn belmove portitajn de l' mondumulinaj de 1850-70, ĉirkaŭ la ŝultroj kaj la brakoj. Grandan sukceson havas la *ruches* (1) el plumoj de koko kaj de struto, kaj tiuj tute vaporaj el tulo samkolora kiel la robo, kaj finitaj per silkaj aŭ veluraj rubandoj formantaj longajn bantojn, aŭ per bukedoj, kiujn, kompreneble, ni preferas naturajn.

Rava novaĵo, tute belvida sur la blankaj roboj el tulo aŭ punto, estas la larĝaj zonuoj el ses aŭ sep atlasaj rubandoj, — kies kolorojn oni zorge devas diversigi harmonie — kiuj fermiĝas flanke per samrubandaj rozetoj.

La novelpensitaj manteloj el *tussor* kaj tolaĵo estas garnitaj per luksaj surkudraĵoj el punto kaj brodaĵo, pasamentoj, pendaĵetoj, kaj estas diversstilaj. Tamen la japana formo tenas la unuan vicon: ĉar, neimageble eleganta estas la « kimono » el atlaso samkolora kiel la tualetoj, sur kiun oni ĝin surmetas.

Vere belega estas la ĉarma harmonio de l' sunombrelo, el sama teksaĵo kiel la kostumo kaj kelkfoje ornamita per la samaj faldoj, brodaĵoj, punktoj, k. e. : kiel ni havas po unu ĉapelo por ĉiu robo, tiel same ni havas tiom da sunombreloj kiom da tualetoj. Plie, ni havas la grablajon uzi ilin kiel bastonetojn, ĉar ili estas tre altaj, pleje el Hina junko, kun tenilo ornamita per orajoj aŭ kristalaj orĉirkaŭitaj.

Sed la plej ŝatinda kreaĵo, entuziasme alprenita de ĉiuj mondumulinaj, estas la ĉirkaŭbrako, kiu, en tute alloga maniero, fiksas la ganton sur la supron de l' brako. Ĝi konsistas el ora rubando — tiel fleksebla kiel vera rubando — pli malpli larĝa, kies fermilo estas ornamita per multekostaj ŝtonoj. Ĉe sia ekstremajo, ĝi estas provizita per truetoj, kiuj ebligas kurtiri ĝin laŭvole. Por la knabinoj oni faras tiajn ĉirkaŭbrakojn el tulo kaj el rubandoj.

Nia hodiaŭa modelo, kies bolero havas epoletojn, de sub kiuj eliĝas falbaloj el Irlanda brodaĵo, estas el rava Hina krepo

brodita per Irlanda brodaĵo. La ĉemizeto el tre maldika lintolajo estas plibeligita per surkudraĵoj el sama brodaĵo.

Nun mi parolu iom pri la sunombreloj, kiujn ni metas sur nian kapon; oni rajtas, ja, doni tian nomon al niaj ĉapeloj, kiuj fariĝas ĉiam pli kaj pli grandaj; tial, ni tute ne bezonas timi, ke post la varmaj monatoj nia nuko estos brulita de l' sunradioj; vere ne; ĉar ĝia Moda Moŝto postulas, ke ni metu niajn ĉapelojn tiel malantaŭen, ke ili estas veraj nukŝirmiloj.

Nun triumfas la blankaj aŭreoloj — ho! senkulpigis mian plumeraron, mi intencis skribi: la blankaj kapvestoj garnitaj per belegaj blankaj flugiloj, kaj la tre malpezaj nunaj ĉapeloj. Ili estas tute faritaj per oblikve tonditaj pecoj el silka muslino kudritaj kiel la pajlo; kelkaj ĉapelistinoj alternigas ilin kun same tonditaj pecoj el tafto. Mi ne forgesu la *Charlottes* (ŝarlot), kiuj, la nunan jaron, strange similas al la baptokufoj.

Sur la luksaj ĉapeloj vidiĝas multego da plumoj aŭ multego da floroj ĉarme aranĝitaj, iafoje intermiksiĝantaj kun samaj floroj el rubandoj, lertege faritaj de niaj kapvestistinoj. Mi vidis dalojn, hortensiojn, mirinde imititajn.

Tre bedaŭre, ĉarmaj legantinoj, mi diras al vi: « Ĝis la sekvonta sezono! » Ĉar ne konjektu, ke mi eligas ĝojan ekkriion pro tio, ke dum kelkaj monatoj mi ne verkos la Modan kronikon; vi pleje ege erarus. Tiel agrable estas labori por la Esperantistinoj — ĉiam tre simpatindaj — ke la momentoj, kiujn mi dediĉas al la Virina paĝo estas vere plezurriĉaj

ROKSANO.

H. M. de la Esp. Vagabonda Klubo.

Mallonga korespondado.

Tamen tute juna. — La pudro *Capillus* (parfumerie Ninon, 31 rue du quatre-septembre, Paris) redonas al la hararo — ne malsekigante ĝin — ĝian unuan koloron. Estas necese, ke vi sendu meĉon da haroj por montri la deziratan nuancan.

R.

Roksano, 1 rue Andoque — ĝis la 15a de Aŭgusto, kaj de tiu dato 2 rue Abélard — Béziers, Hérault, Francujo, respondas private la leterojn enhavantajn 50 centimojn, kaj per la revuo tiujn enhavantajn 25 centimojn.



El « Le Journal des Modistes »
16, Rue Vivienne, Paris.

(1) Larĝegaj ĉirkaŭkoloj.



Bibliografio.

Gramatikaj verkoj :

« The Esperanto language, grammar and commentary ».
 Ampleksa volumo por la anglaj samideanoj, de Major-General George Cox. Tiu verko, bonege presita, estas fama en Britujo, kaj la dua eldono, reesplorita kaj plenigita, havos certe la sukceson de la unua. Ĉe *British Esperanto Association*.
 « Grammaire complète d'Esperanto », de Camille Aymonier. Ĝi estas verkita por Francoj, laŭ la plano de la plej bonaj francaj gramatikoj. La aŭtoro celis, tiel, ĉu memoriĝi pri la gramatiko franca tiujn, kiuj ĝin eklernis, ĉu ĝin intrui, laŭbezono, samtempe kiam la Esperantan.
 La volumo, tre interesa, estas eldonita laŭ la kutima zorgo de la eldona firmo. Ĝi rimarkigas sin per plena konformeco al la principoj donitaj de D^{ro} Zamenhof mem, kaj la forigo de senutilaj diskutoj. (1 f. 50, ĉe *Hachette & Cie*, Paris).
 « Esperanta Sintakso », de Paul Fruictier. Dua eldono. Tiu volumo, verkita de unu el la plej malnovaj kaj konataj esperantistoj, devus troviĝi en la manoj de ĉiuj veraj esperantistoj. Nun la modo ŝajnas esti kredigi, per dikegaj gramatikoj, senfinaj diskutoj en specialaj gazetoj, ke Esperanto estas malfacila lingvo. En sia verko, S^{ro} Fruictier ne tiel eraris: li nur montras, per ekzemploj eliritaj de D^{ro} Zamenhof mem, kiel estas aplikitaj de la Majstro, do aplikotaj, la 16 simplaj reguloj de la gramatiko! Ĉar la sintakso estas verkita nur Esperante, ĝi taŭgas por ĉiulingvaj samideanoj (1 fr. 50, ĉe *P. E. S.* kaj ĉe *Hachette & Cie*).

« Pri la elparolado de la vokaloj en Esperanto », de E. Ĉefeĉ. La volumeto enhavas poŝtkarton kun la adreso de la aŭtoro kaj preparitan respondon, nur plenigotan de kelkaj vortoj, pri la temo traktita de S^{ro} Ĉefeĉ, kiu estas ne sole praktikema kaj agema homo sed ankaŭ lerta serĉisto, (40 c. ĉe la aŭtoro, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W.).

Por la propagando:

« L'Esperanto », de L. de Beaufront; nova formo de la malnova kaj bonega broŝuro 122 bis. (15 c., ĉe *P. E. S.*)
 « Solvita demando de internacia graveco » por Rusoj, de H. T. Rjahovski.

Eldonoj de l' Esperantista centra oficejo: Dua universala

kongreso de Esperanto: 1 fr. 50. — Esperantista societaro (dua eldono korektita ĝis la 31^a de dec. 1906) kun adresoj de konsuloj kaj Esperanto-oficejoj: 1 fr. 50: Ambaŭ verkoj tre interesaj kaj atentindaj.

Th. Cart: Esperanta radikaro kun ŝlosilo-repertorio 1 fr. — Rapport sur l'Esperanto, sendita al la ministro de l' publika instruado. 75 c.

Treklare redaktita, ĝi bonege resumas nian nunan situacion kaj certe utilos la klopodojn por enkonduko de Esperanto en la instruajn programojn.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponitaj kaj solvoj, amuzaj, devas esti senditaj al sinjoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « Miksajoj ». La personoj, kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.
 2^e Krom esceptoj speciale direktaj la solvoj devas esti senditaj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.
 3^e Divenintoj estas ordigitaj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.
 4^e Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.
 Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.
 Neniam sendi karton surhavantajn kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

Problemo 34^a (DE D^{ro} LIPKA) Ŝarado.

Se min volus diveni, kara legataro
 En profundaj min serĉu riĉega de l' maro
 Kaj sur korpo de l' homo estas mi trovata
 Kaŝanta min por okul', nepre malbenata.

Se tamen vi ne povus min diveni tute
 Divenu do min parte — povos absolute.

Mia kapo — rivero, ĝin ja konas mondo :
 Vastan valon belegan fluas ĝia ondo....
 Mia kapo duoble — la servanto Dia,
 Mia trunko kun piedo — on' de l' buŝo ĉia....
 Fine, solvo de l' problem' multe faciligas
 Ke kap' mia, de l' piedo neniel distingigas....

Problemo 35^a (DE CH. BRUNET).

Ĉe poŝtofacejo. — Kial knabeto, kiu gluas poŝtmarkon, ĝin aĉetinte, similas kampan floran.

Problemo 36^a (DE LA SAMA).

Ĉu vi estas vegetarano? manĝu min. Ĉu vi estas karnano? ankaŭ manĝu min sed post miksado. Fine se vi eltirus parton de mi, atentu la malsanon teruran.

Problemo 37^a (DE LA SAMA).

2 lamuloj kiuj strabas
 2 kripluloj kiuj ne vidas
 2 strabuloj kiuj lamas
 2 blinduloj kripligitaj
 Kio estas?

Problemo 38^a (DE J. FLOURENS).

Mi haltigas: ne sangu mian kapon, tial ke, ho! naŭzo, mi fariĝas malbonodora besteto.

Problemo 39^a (DE LA SAMA).

1	2	3	prepozicio
2	3	4	eifero
3	4	5	estaĵo

La Reĝino de Siam'.

Ĉar reĝo Chulalongkorn baldaŭ vizitos Parizon, ni diros kelkajn vortojn pri liaj edzinoj. Oni scias, ke li kunkondukas dekdu; sed ili ne dancos kiel tiuj akompanintaj Sisovath. Aliparte, ĉiuj ne estas reĝinoj.

La sola kiu rajtas havi tiun ĉi titolon estas Sowapa Pongsi, la duonfratino de l' reĝo, naskiĝinta el la sama patro kiel li, sed el alia patrino. Antaŭ dudek kvin jaroj, kun ŝi edziĝis Chulalongkorn. Ŝi naskiĝis en la 1864^a jaro, sed ne ŝajnas tiel multjara kiel ŝi estas: la Siam'anoj opinias, ke ŝi estas ankoraŭ juna. Sowapa Pongsi havas la plej malgrandajn piedojn kaj manojn el la Bangkok'aninoj. Nemulte ŝin vidos la Parizanoj, ĉar ŝi konservas la plej plenan inkogniton (1) kaj eliros nur vualita.

J. FIZE.

(1) Latine: *Incognitus*; france, angle, hispane kaj itale: *incognito*.

RIMARKO: Mi ricevis kelkajn problemojn nekonformajn al la reguloj de nia Zamenhof'a lingvo. Mi ne povas ilin publikigi, kaj petas ke oni ne sendu tiajn formojn de problemoj.

Al kelkaj demandintoj. — Ĉiuj legantoj de « Tra la Mondo » povas sendi problemojn. Eĉ ili estas petataj ĝin fari, ĉar tiu kunlaborado donos pli grandan variecon al nia paĝo « miksajoj ». Oni povas sendi problemojn kun desegnaĵoj. Mi konservas ĉiam la rajton elekti aŭ forĵeti ĉiujn proponataĵojn, ĉu pro netaŭgeco por nia Revuo Familia, ĉu pro tro granda aŭ malgranda facileco.

CH. BRUNET, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux.

GRAVA AVIZO ! Pro la malfrua epoko de la kongreso

dum la Aŭgusto monato, kaj la neebleco ricevi sufiĉe frue ilustraĵojn, nia 2^a Numero aperos samtempe kiam la 3^a. Ambaŭ do kune formas duoblan numeron.

« T. L. M. »

Interkompreniĝo ĉe la ambulancoj kaj hospitaloj dum milita tempo.

Nia januara artikolo pri « Esperanto kaj Ruĝa-Kruco » elvekis la atenton de multaj personoj, inter kiuj sufiĉe da ili, milittempe, estus flegataj aŭ flegantaj sur la batal-kampoj. Oni petis nin, denove aludi tiun gravan temon, kiu, krom sia propra intereso, estas tre taŭga por esperantemigi personojn, ĝis nun indiferentajn pri Esperanto, petante ke, iafoje, ni donu detalojn pri la progresoj de la ideo Esperanto — Ruĝa-Kruco.

Plezure ni plenumos tiun deziron, kaj ni estas feliĉaj enpresi hodiaŭ artikolon de nia fervora kunbatalanto leŭt^o Bayol, jam konata de niaj legantoj.

Okaze, ni enpresos mallongajn raportojn pri la esperantista movado en la diversnaciaj Ruĝ-Krucaj Societoj,

La unua paragrafo de l' teksto de la nova *Interkonsento por plibonigi la sortojn de l' vunditoj kaj malsanuloj en la militantaj armeoj* diras: « sen diferenco por ilia nacieco, la militistoj kaj la aliaj personoj oficiale alligitaj al la armeoj, estas deve respektataj kaj flegataj de la militanto, kiu tenas ilin en sia dispono. Tamen, la militanto devigita forlasi malsanulojn aŭ vunditojn al sia kontraŭulo, restigos kun ili, en la mezuro, laŭ kiu tiu ebligas la cirkonstancoj militaj, parton de siaj sanitaraĵoj oficistoj kaj materialoj, por kontribui al ilia flegado. »

La flegejoj de Ruĝa-Kruco estos do veraj « Balbel'aj Turoj ». Precipe en la militoj inter diversnaciaj armeoj kunigitaj, la interkompreniĝo estos tre malfacila.

La jenaj eltirajoj el la fama verko « Rememoro de Solferino » de Dunant, l' iniciatoro de l' Interkonsento de Genevo (23^a de Aŭgusto 1864), tuj tion pravas nedubeble:

« Resaniĝanta Piemontano, parolanta france kaj itale, « tradukas la petojn de la francaj soldatoj al la lombardaj « kuracistoj: oni konservas lin, kiel tradukiston.... »

« Sur la stratoj, rakontas Dunant, mi estis pli ol unu fojon haltigata de bonaj burĝoj, kiuj petegas, ke mi traduku la dezirojn de francaj vunditaj oficiroj, loĝantaj en iliaj domoj, sed kies lingvon ili ne komprenas. La malsanuloj, ekscititaj, malkvietaj, incitigas ĉar ili ne estas komprenataj, tute malĝojigante la zorgantojn, kies plej koraj afablaĵoj estas akceptataj kun malbona humoro ofte elvokata de febro kaj sufero. Unu el ili, el kiu itala kuracisto deziras tiri sangon, kredas, ke oni volas fortranĉi lian brakon, kontraŭbatalas per ĉiuj fortoj, varmigas kaj faras al si teruran malbonon.

Kelkaj klarigaj vortoj, elparolitaj en ilia gepatra lingvo, solaj prosperas forigi tiujn bedaŭrindajn malkomprenojn kaj kvietigi, trankviligi tiujn kriplulojn el Solferino. »

Pri ĥirurgia operacio farota de ĥirurgiisto franca helpata de flegistoj lombardaj:

« Nun prezentu al vi tian operacion ĉe Aŭstria kromprenanta nek italan lingvon nek francan kaj lasanta konduki sin kvazaŭ ŝafon al buĉo, ne povante interŝanĝi unu vorton kun siaj bonfaremaj turmentistoj! »

Pli malproksime:

« Ĉu tiuj mortintoj, forlasitaj en la Castiglione'aj ambulancoj, en la hospitaloj en Brescia — el kiuj multaj ne povis kompreni sin por malsameco de lingvoj — estus ellasintaj la lastan spiron, malbenante, blasfemante, se ili estus havintaj apud si kompatemulon por ilin aŭskulti, por ilin konsoli? »

La bezono faciligi interkompreniĝon ĉu inter flegatoj kaj flegantoj, ĉu inter diversnaciaj flegantoj inspiris al itala

senatano *Torelli* ideon eldoni bonegan trilingvan « *Vortaro por la memola flegisto de la militvunditoj* », kiu aperis en la jaro 1866a, tro malfrue por esti uzata dum milito prusa-aŭstria, sed kies helpo estis grandega tuj post la milito, ĉe la hospitaloj militaj kaj nemilitaj.

Antaŭ la milito franca-germana en 1870, aperis franca-germana eldono de l' poŝvortaro de *Torelli*; pli ol 1600 ekzempleroj estis disdonitaj, kaj multaj malsanuloj benis tiun utilan interkomprenilon. Sam n jaron, simila libreto germana-franca estis eldonita de la *Germana Societo de Ruĝa-Kruco de Wien* (Vieno).

Fine en la jaro 1876a aperis la unuaj eldonoj de rimarkinda verko « *Der internationale Lazaretsprachführer* » de *Paul Blaschke*. La bonfarema verko de ĉi tiu filantropo konsistas el dulingvaj gvidlibretoj enhavantaj 1500 vortojn; al ĉiu vorto estas aldonita elparolado kaj almenaŭ kvar frazoj aŭ esprimoj rilataj al ĝi.

Sed kiaj malfacilaĵoj, por plene efektiviĝi tiun bonegan planon! Unue, ne estas eble antaŭscii, en kiuj lingvoj oni bezonos verki la libretojn; sekve estus necese, ke ĉiuj ŝtatoj po-edu tiajn gvidlibretojn en multege da malsamaj lingvoj. Kia malsimpleco!

Plie la elparolado de ia fremda lingvo, transskribita per naciaj sonoj, ne povas esti ĉiukaze tute ĝusta; eĉ se ĝi estas ĝusta rilate la pli ĝeneralan elparoladon en la fremda lando, ĝi ne estas tia por iaj regionoj de tiu lando, kie la elparola maniero pli malpli malsimilas la pli ĝeneralan. De tio devenas malfacila aŭ eĉ neebla interkompreniĝo.

Do la solvo de S^{ro} Blaschke, kvankam nedubebla progreso, ne estas simpla, ne estas vera solvo.

Sed kiel, do, plifaciligi la necesegan interkompreniĝon en ambulancoj kaj hospitaloj dum milita tempo?

Nur lingvo helpa internacia, absolute neŭtra, elparolata same en ĉiuj landoj, ne okaziganta la suprediritajn malfacilaĵojn, povis liveri la solvon de l' problemo. Tiam lingvon, ni hodiaŭ ĝin posedas, ĝi estas Esperanto; kaj per ĝi, tute facila iĝas la efektiviĝo de la ideo de S^{ro} Blaschke. Estas apenaŭ necese ĝin diri, en Esperanta gazeto!

Sola gvidlibreto por ĉiu lando, en nacia lingvo kaj Esperanto, kun la Esperanta elparolado montrata nacilingve, sufiĉos kiel interkomprenilo. La uzado de nia lingvo, niaj kongresoj, ĝin montris absolute.

Plie, kio ne estis ebla antaŭe, la kombino de la « Gvidlibro Esperanto — Ruĝa-Kruco » kun la ŝlosilo Ĉefeĉ, permesos rapide eliri el la malmultenombraj esprimoj de la gvidlibro, ebligante paroli pri iu ajn temo, kaj tio estos nova bonfaro por la militvunditoj, ne la malplej granda, de Esperanto.

LEŬTENANTO BAYOL,
Lernejo St Cyr.

PROPAGANDO EN LA ARMEO.

Militistoj esperantistaj.

L^{to} Bayol. Instruktoro ĉe la milita lernejo St. Cyr (S. et O.) France: Esperanto kaj Ruĝa Kruco.

D^{ro} *Artigues*. 5a Reg^{to} pionira (5e Rég^t du génie) Versailles (S. & O.) Francujo.

L^{to} *Populus*. 36e Inf. Reg. Caen (Calvados) Francujo.

L^{to} *Silvestriev* pioniro. Ŝumen, Bulgario: Skermo.

K^{no} *Fortin*. Tananarive (Madagascar).

K^{no} *Capé*. Orléans, Francujo: Dez. sciigojn pri la propagando en ĉiunaciaj militaj rondoj

Eks-L^{to} *Salomon*: Kontraŭalkohola demando.

Kol^o *Hudjakov*. Nikolaistad, Finnlando: demandoj religiaj, moralaj, socialaj kaj militaj.

K^{no} *Guillot*. Agen (Francujo).

K^{no} *Raymond Subsol*. Béthune, Francujo.

K^{no} *Comte*. 62, R. de Tivoli, Boulogne-sur-Mer, Francujo: propagando en maristaj rondoj.

L^{to} *Martin*. 6e bataillon de chasseurs, Nice, Francujo.

K^{no} *Lefebvre*. Le Bouchet, Francujo.

L^{to} *Eugène Loyot*. Lernejo de l' enlandaj suboficiroj *Sept Pagodes*, Tonkin.

Maroficiro *Mauricio Helmold*. Rua S. José (1a Andar) Rio de Janeiro, Brésil.

Majoro *J. Barraud*. 113a Inf^a Reg^{to}, Blois (Loir et Cher), Francujo.

L^{to} *Boussety*. 113a Inf^a Reg^{to}, Blois, (L. et C.) Fr.

K^{no} *M. Sailleus*. 24a Kolonia R^{to}, Perpignan (Pyr. Or.) Fr.

Ni ricevis varmajn dankojn de la jenaj militistaj aŭtoritatoj pro la sendo de dokumentaro enhavanta la interesan « Tra Mez-Afriko » de Komandanto Lemaire: generaloj komandantaj la Supran militan lernejon, la Politeknikan kaj St Cyr'an lernejojn; la kolonejoj komandantaj la 30^{an} kaj 32^{an} artileriajn regimentojn kaj la 131^{an} infanterian reg. Aliaj dok. estas senditaj al la komandanto de aviso « Ibis ». « Tra Mez-Afriko » estas donacita kiel premio al la militista kurso en Bourges (Prof.: S^{roj} Esselin kaj Segretinat), Tours (S^{ino} Guivy), Tananarive (K^o Fortin), Ancenis (Ajd^o Giacobbi). Ni daŭrigos dissendi, ĉiulanden, la restantajn ekz. kaj aliajn dokumentojn, en la kondiĉoj cititaj lastmonate. (Oni aldonu 50 c. por la afranko).

LA DUDEKJARA JUBILEO DE ESPERANTO.

Kiam aperos tiu numero ĝi estos okazinta, kaj grandsukeese, en multaj urboj aŭ regionoj ĉiulande.

Pro tio ni povas esti fieraj, ĉar grandparte dank'al « Tra la Mondo » la festo, kies eĉ principo — prezentita je l' nomo de S^{ro} Otto Simon — estis forĵetita dum la Geneva kongreso kaj sajnis mortinta, reviviĝis.

Tuj post la kongreso ni instigis D^{ro}n Zamenhof fari tute aproban deklaraĉion por la ideo kaj diskonigis ĝin; ni preparis la aferon kun S^{ro} Tabinski frapita de nia artikolo, kaj kiu lerte pensis pri la elektinda dato; ni faris fine la neceson por ke ĝenerala helpo de nia gazetaro elveku ĉie la atenton.

Mi tre kore dankas la kunfratojn, kiuj tiel respondis al nia alvoko, komprenante ke super personaj demandoj alte regas la ĝenerala intereso de nia kara afero. Mi dankas ankaŭ la aliajn, kiuj, kvankam apogante la ideon, zorge silentis pri « Tra la Mondo », simiante la naciajn gazetojn, kiuj ne emas reklami unu por la alia.

La esenca afero estis starigi nian feston kaj doni al nia amata Doktoro unu el tiuj ĝojoj, kiujn li pli amas: intima, kora ĝojo, ne ofendante lian modestecon.

Sed li ne povos malhelpi ke, tra « Esperanto », la koroj kaj pensoj niaj iros al D^{ro} Zamenhof.

A. MONTROSIER.

Multurbe oni preparis ageme la feston ĉu per paroladoj, ĉu per antaŭaj kunvenoj kiel en Bourgogne (Francujo), ĉu per amikaj vesperfestoj.

En Brazilujo la festo estos speciale brila ĉar ĝi okazos post la Brazilia Kongreso, zorge kaj lerte preparita, kiu certe multe helpos la antaŭen iradon de niaj fervoraj kunbatalantoj. Pri ili nia bonega kunfrato « Brazilia Esperantisto » nin donas monate la plej kuraĝigajn sciigojn. La kongreso kunsidis en la salonoj de du gravaj societoj de Rio de Janeiro: S^{to} de Komercoficistoj kaj S^{to} de Terkulturo. Rimarkinde estas, kaj gratulinde, ke « Brazilia Esperantisto » enpresas la nomaron de l' Brazilaj kluboj kun fondodato, kiel faras tre utile « British Esperantist » kaj « Germana Esperantisto ».

Inter la preparaj festoj estas ankaŭ citinda tiu organizita de la S^{ro} Espero en Leopolo, pri kiu raportis « Pola Esperantisto », kun partopreno de eminentaj artistoj: A. Ludwig, majstro de l' pola kanto; Dianni, fama tenoro konata en multaj landoj, Francisko Wysocki, Izobert, A. Dolzycki, Fin^o K. Laska kaj Romanska. D^{ro} K. Nizynski talente akompanis la kantantojn. En la programo, « La Vojo » laŭ la muziko de nia amiko Deshays, E. V. K. ano.

Tiu « Esperantista Vagabonda Klubo » organizis ankaŭ tre sukcesintan koncerton en Brighton, sub direktado de la sindona kaj talenta prezidantino, Fin^o Oxenford. Laŭ la vortoj mem de tiu lasta, ĝi efikis pli ol sesmonata agado.

STELETO.

Por la virinoj kaj junulinoj.

Aperos dum la Kongreso poŝhorloĝo « L'Espero » por virinoj kaj junulinoj, ore kaj arĝente.

Certe ĝojos pro tio niaj ĉarmaj legantinoj, kiuj ofte envie rigardis sian edzon, patron aŭ fraton.

Ĉar preskaŭ ĉiuj pers^onoj deziris nur la unuan kvalitat^on de nia bonega poŝhorloĝo, la fabrikisto eldonas de nun sole tiun modelon kaj ne plu la duan kvalitat^on.

Afrika propagando.

La grupo esperantista en Alĝero kreis senpagan monataĵon « Afrika Esperantisto », por interrilatigila afrika n^o samideanojn.

Ĝi petas, ke oni bonvolu sendi al « Afrika Esperantisto », 4 Rue du Marché, Alger, Alĝerujo, la nomojn, adresojn, k. t. p. de esperantistoj loĝantaj en Afriko, precipe Alĝerujo, Maroko, Tunisujo, Egipto, Madagaskar, Transval, Sud-Afriko, Gvineo, Kongolando, k. a. — Ni deziras sukceson al tiu nova kunfrato, vigne direktata kaj praktike redaktata.

Diversaĵoj.

S^{ro} Boitard, esperantisto en Pierre (Francujo) kolektis en « L'Esperantiste » la nomaron de ĉiuj Atestuloj (atesto pri kapableco por Francujo). Antaŭ la unua de januaro 1907, li jam kalkulis 363 atestulojn dissematajn, laŭ la sekvanta maniero, en la 86 departementoj:

31 enhavas nenium kapablulon.

36 enhavas de 1 ĝis 10

9 enhavas pli ol 10.

nome: 1. Seine	82
2. Pas de Calais	37
3. Rhône	34
4. Nord	18
5. Côte d'or	16
6. Somme	14
7. Meurthe et Moselle	12
8. Seine inférieure	12
9. Indre et Loire	11

Rimarkigu ni, ke multnombraj esperantistoj, kies kapableco estas bone konata, ne pensis aŭ ne deziris akiri la diplomon de la S. f. p. E. (ĉiujare ni presigos tiun ĉi statistikon interesan).

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE la lastan tagon de ĉiu monato.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al:

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Urgaj sciigoj: REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ de 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta N^o

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono: 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro: 12 fr.) — Duona: 4.50 fr. — Kvarona: 2.25 fr. — Unu kajero: 75 c.

RIPREZENTANTOJ: Brita Imperio: British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.
Svedujo: S^o P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, kaj EN ĈIUJ FRANCAJ STACIDOMOJ.

POŝTAJ ABONOJ en la jenaj landoj: Belga, Dana, Franca, Itala, Norvega, Portugala, Sveda, Svisa.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Oficejo Esperantista

Ĝenevo-Svislando.

Kelkaj el la lastaj originalaj artikoloj:

- Universala kalendaro, de CARLO BOURLET, Parizo (Franc.).
- Deveno de *l' speco ĉe la lepidopteroj*, de P. A. H. MUSCHAMP (Angl.).
- Projekto pri internacia atlaso de « erozio », de E. CHAIX, Ĝenevo (Svis.).
- Evolucio de la religia ideo, de D^{ro} L. VALLIENNE, Parizo (Franc.).
- Pri la uzebleco de la fortoj de *l' homo*, de ANDRÉ BROCA, Parizo (Franc.).
- Nuna Stato de Internacia Bibliografio, de J. HANAUER, Frankfurt a/M. (Germanujo).
- Projekto pri internacia monsisistemo, de R. DE SAUSSURE, Ĝenevo (Svis.).
- Pri kelkaj Merovingaj kaj mezepokaj kranioj trovitaj en Angers (Franc.) de G. V. DE LAPOUË, Angers (Franc.).
- Nova speco kaj nova gentonomo de formikoj, de D^{ro} A. FOREL, Yvorne (Svisujo).
- Psikologio de *l' popolamasoj*, de P. LAPIDARI, (Ital.).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono : 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj), aŭ 7 frankoj.

Unu numero : 25 spesdekoj aŭ 65 centimoj.

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno, (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo)

★ ESPERANTO ★

Duonmonata internacia Gazeto.

La plej ofta ! La plej malkara ! La plej disvastigata !

Tutmonda Informilo — Korespondantoj en ĉiuj landoj. — Informoj pri politiko, komerco & industrio, financo, statistiko, leĝoscienco, instruado, teatro, k. t. p.

Felietono — Kroniko politika — Internaciaj Enketoj — Konkursoj por la legantoj kun valoraj premioj.

Esperanto, en speciala parto, publikigas ĉiujn sciigojn pri la praktika uzado de Esperanto; ĝi estas la organo de la konsuloj, Esp. Oficoj, kaj specialaj peresperantaj societoj.

Esperanto aperas en ĵurnala formato. Ĝi estas aĉetebla ĉe la belgaj, francaj, svisaj, svedaj, stacidomoj, kaj ĉe multaj publikaj ĵurnalvendejoj en ĉiuj landoj.

Unu numero : 10 centimoj (4 Sd.). Jarabono : 3 frankoj (1,20 Sm.).

Direkcio : 8 rue Bovy-Lysberg, Genève [Svisujo].

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato.

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ ESPERANTISTAJ
GAZETOJ FONDITA EN 1895.

ADMINISTRACIO :

Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

JARA ABONO :

Sen Literatura Aldono 2 Sm. aŭ 5 fr. »
Kun Aldono 3 Sm. aŭ 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio : Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
N^o 270,042. N^o 13,195
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o

GARTHLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso : Esperanto - Glasgow.

MILKA
VELMA
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANGĪ.



ESPERANTINO

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1900

Prezo : FRANCUJE. — 11 £ 50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 £ ĉiu botelo prenita en S^t Etienne, impostoj kaj transporto pl...

Ĝenerala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo

J. B. Brunon-Chauvet
S^t Etienne (Francujo)

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

Ni akceptas nenian respondecon pro la nericevo de la gazetoj. Tiukaze, oni sin turnu senpere al la administracioj.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Eho Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^o Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

Eksport Jurnalo. — Internacia Revuo por komerco, Industrio kaj Tekniko. Jare: 5 fr. (2 Sm.). — Ĉe Esperanto Verlags-Anstalt Emil Schnell, G. m. b. H. Frankfurt a. M. Germanujo.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — (1,20 Sm.) Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. — Speciala anonco.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Speciala anonco.

Juna Esperantisto. — Speciala anonco.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Lingvo Internacia. — Speciala anonco.

Socia Internacia Revuo. — Priraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

FOTO-REVUO

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La Foto Revuo Internacia n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue: c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. (2 Sm.) por ĉiuj landoj.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Afrika Esperantisto. — Senpaga. 4, Rue du Marché, Alger, Algérie. Por afrikaj samideanoj.

The American Esperanto Journal. — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard station, Boston, Mass. (U.S.A.)

Amerika Esperantisto: 1 dol. (2 Sm.) L'Amerika Esperantisto, Oklahoma City. U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) Jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro, aŭ ĉe « Tra la Mondo ».

Bulgara Esperantisto. — 1 fr. 50, (0,60 Sm.). Sofio, Bulgarujo.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.). Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovrililo kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N^o: 35 cent. (14 Sd.)

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Sciencia kaj literatura. 4 fr. (1,60 Sm.). Ĉe S^o Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV.

Finna Esperantisto. — Ilarejo esperantista, Helsinski, Finnlando. 1 fr. 50 (0,60 Sm.) por la 1^a jaro.

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate) Redaktata germane kaj Esperante. Jare 4 fr. (1,60 Sm.). Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Helpa Lingvo. — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kr. (0,70 Sm.). Admin. ĉe Rind G. Mönster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 2 fr. 60 (2 Sm.). — N^o 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Pioniro. — Jurnalo Esperanta India. Jare: 5 fr. (2 Sm.). Red. kaj Adm.: Hona Sek. de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.). Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjačeskaja, 24, al la S^{to} « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEMJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D^{ro}: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. (1 Sm.). Ĉiuj informoj pri la bicikletoj kaj mekanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

De Lushof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj jurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. **Petu specimenon.**

Il Cittadino Italiano. — Itala familia gazeto, Via della Posta, 16, Udine.

Tous les Sports. — Oficiala Gazeto de l'Unuigantaro de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj (100,000 anojn) D^{ro} Raoul Fabens, 29, Rue N.-D. de Nazareth, Paris. — Konstanta rubriko en Esperanto de ĉiulandaj kunlaborantoj. Jarabono: Paris 9 fr.; Dep. 10 fr.; Alil. 12 fr. — Por U. S. F. S. anoj jare: Paris 5 fr.; Dep. 6 fr.; alil. 8 fr. — Unu numero 0.15 en francaj stacidomoj. Petu specimenon. (1 fr. = 0,40 Sm.)

Ĉiu esperantisto estas petata insisti ke la librovendistoj de la urbo ĉiam tenu provizon da niaj propagandiloj kaj elmontru en siaj fenestroj niajn reklam-kartonojn. Ni sendas afranke, ĉien en la mondo, centojn da « Ŝlosiloj » po 3.50 fr. kaj da « Tutoj » po 7.00 fr. Skribu al

Internacia Propagandejo Esperantista,

Merton Abbey, London, S. W.

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantaj tuj kaj senprepe decifri kaj legi ĉion Esperante skribitan » Rimeteblaj en leteron sen pliiĝo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, dana, franca, germana, hispana, itala, sveda, portugala eldonoj, kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsigno estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emile Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.). Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50

VERVIERS, Place Verte, 20.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTEBYCK, Presisto, Bruĝo.